



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Oktoebro 2017 n-ro: 22



Merhaba,

Ekim sayımızda da normalde 24 olan sayfa sayımızı aŝip malzeme fazlalığından 36 sayfaya ulaŝtık. Bu sayımızda da birbirinden ilginĉ yazılar var, bunlardan bazıları özel olarak yazılıp dergimize gönderilmiş makaleler.

Geĉen ayın önemli bir olayı, dñnyaca ünlü Oxford profesörü, esperantist, yazar ve ŝair Marjorie Boulton'un vefatı. Esperanto dñnyasının zamansız olmasa da bu büyük kaybı konusunda dergimizin 11. sayfasındaki makaleyi okuyabilirsiniz.

Bir baŝka önemli mesele de insanların neden Esperanto öğrenmedikleri. Bu konuya dair bir analizi de sayfa 12'de bulabilirsiniz.

Luis Jorge Santos Morales'in nasıl Esperanto öğrendiğine dair hikayesi de 26. sayfada baŝka ilginĉ bir konu.

Georgi Miĥalkov'un 9. sayfadaki hikayesi de okunması gereken baŝka bir yazı.

Ancak bu sayıdaki okunulması gereken yazılar sadece bunlar değil...

Hepinize iyi okumalar...

Saluton,

Ni ankaŭ en la oktobra numer superis nia normalan paĝnombron kiu estas 24 kaj nia revuet fariĝis 36 paĝlonga. Ankaŭ en ĉi tiu numero estas multaj interesaj artikoloj, kaj kelkaj el ili estas artikoloj senditaj eksklusive al nia revueto.

Unu grava okazaĵo de la antaŭa monato estis la forpaso de la mondkonata verkistino kaj poetistino, esperantistino el Oksfordo Marjorie Boulton. Tiu forpaso kiu eble ne estis neatendita, estis granda perdo por nia komunumo. En la 11-a paĝo estas artikolo pri Marjorie Boulton.

Unu alia grava afero estas, kial homoj ne lernas Esperanton. Pri tiu povas lei e paĝo 12.


Luis Jorge Santos Morales rakontas pri kiel li lernis Esperanton. Tiun rakonton vi povas trovi ne paĝo 26.

La rakonto de Georgi Miĥalkov en la 9-a paĝo estas alia leginda verkaĵo.

Sed ne nur tiuj estas la legindaj artikoloj en ĉi tiu numero...

Bonan legadon al ĉiuj...

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
Slovaka prez. de la Ĝenerala Asembleo de UN	4
Lerneja ĝemeligo inter Istanbul kaj Kuŝimoto DIONIZO (ΔΙΟΝΥΣΟΣ)	4
La nova Tekstaro ...	5
Avantaĝoj de dulingvismo (parto 1/2)	6
Aktivu por la Aŭtuna E-renkonto. ...	7
Du Biletaj por Teatro	8
INTER-FEST Sukcesa kaj Impona	9
Forpasis Marjorie Boulton	10
Zamenhofa Stilo	11
Kial oni ne lernas Esperanton?	11
Esperanto denove dum Woodstock!	12
El la libro de "Dao de Ĵing" (14)	13
Dankon Amiko (9)	14
Ŝercoj	15
Kurcvort-enigmo	16
Nova interreta E-kurso ...	16
Oferto de kontrakto doktoriĝa ...	17
Religia kulturo en Japanio	17
Mallonga Historio de Filozofio (20)	18
La 15-an de aŭgusto 2017	21
Kiam oni lernas novan lingvon	22
La unua IJK en Afriko: Granda sukceso!	23
Mia Stranga Malkovro de Esperanto	25
Kio estas Ulambano?	26
Duafoje en Seulo	26
Poemoj	28
Sonfiguroj en Esperanto – ĉu vi kapablas rimi?	29-30
En la ombro de la luno	31
Esperanto Kurso (21)	32
Gramatiko - Esperantaj participoj en turka lingvo	34
Gramatiko - Lingvaj Respondoj (8)	35
VeganArto	35

Kursoj



1) La kurso(j) en la Lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbul baldaŭ komencos.


2) Estas plano okazigi la kurson por komencantoj en Kadıköy distrikto ĉijare dum tri monatoj en Özen Berkol Doĝan Sciencfikcia Biblioteko (vidu Turka Stelo #21 p.22). Sed ankoraŭ la nombro de interesiĝantoj ne estas konata.

3) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.



Okazis prezento pri Esperanto kaj enkonduko al Esperanto lingvo por ne esperantistoj en la "Sciencfikcia Biblioteko Özen Berkol Doĝan"

Klaku dekstren, sur la bildo, por elŭti la duan numeron de Unesko Kuriero en Esperanto



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La **48-a Internacia Esperanto-Sumoo** okazis inter la 10-a kaj 24-a de septembro. La rezulto ne estis preta

ankoraŭ en la tempo, kiam ni preparis ĉi tiun numeron de nia revueto. Do, ni raportos la rezulton en la venonta numero.

El Turkujo partoprenis nur du legantoj, Mehmet Fatih Yüce kaj Vasil Kadifeli.

Tri legantoj elektis kiel legolibro la "Turkan Stelo"-n, kaj ni fieras pri tio.

Jen informoj pri la Esperanto-Sumoo:

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>


Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Grupo de Sumoistoj en Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 698 (2017-08-18)

Tut-Amerika Kongreso de Esperanto okazos en 2018 en Havano

De la 11-a ĝis la 17-a de februaro 2018, Havano gastigos la 9-an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto. La kongresa temo estos "Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en La Amerikoj". [...]

<http://www.esperanto.cult.cu/index.php/52-lingvoj-kaj-kulturoj>

N-ro 699 (2017-08-23)

Biblioteka Apogo Bachrich atendas subvencipetojn
UEA disdonos por la kvara fojo subvenciojn el la Biblioteka Apogo Maria kaj Johano Bachrich por helpi pliriĉigi kolektojn de Esperanto-bibliotekoj. [...]

N-ro 701 (2017-09-04)

Forpasis HAN Moo-hyup (1923-2017)
En la aĝo de 94 jaroj HAN Moo-hyup forpasis la 22-an de aŭgusto 2017 en Bundang, Koreio. Li naskiĝis la 22-an de aŭgusto 1923 en Pjongjango. Li estis emerita dustela generalo de la Korea Armeo, esperantisto ekde 1976, prezidanto (1979-1981, 1990-1994) kaj [...]

N-ro 702 (2017-09-11)

Alvoko por kun-redaktoro de Unesko-Kuriero en Esperanto
Por subteni la eldonadon de Unesko-Kuriero en Esperanto, UEA nun invitas kandidatiĝojn por korekti kaj redakti tradukaĵojn de Unesko-Kuriero en Esperanto ekde oktobro 2017. La kun-redaktoro ricevos modestan honoraron ĝis 200 eŭroj por ĉiu numero, [...]

TEJO



Partoprenu la ekeventon en Italio de la projekto pri lingvinstruado helpe de

Erasmus+


Malferma alvoko por 3 partoprenantoj: vojaĝu senpage al Norda Italio (ĉirkaŭaĵoj de Trento) kaj partoprenu la ekeventon de la projekto pri lingvinstruado, subtenita de Eŭropa Unio kadre de la programo Erasmus+! Ĉu vi estas aktivulo kiu instruas Esperanton aŭ aliajn lingvojn? Venu al Trento por kontribui al la kreado de altnivela laborplano por la venonta [...]

Helpu trovi loĝejon por TEJO-volontuloj en Roterdamo aŭ ĉirkaŭaĵoj

TEJO bezonas loĝejon ideale por 3 homoj kiuj volontulas en la Centra Oficejo. Solvoj por 1 ĝis 4 homoj estas ankaŭ bonaj. Ni serĉas lokojn ne nur en Roterdamo sed ankaŭ en la ĉirkaŭaĵoj, ĝis maksimume 45 minutoj da vojaĝo ĝis la Oficejo. La volontuloj de TEJO estas valoraj junuloj kiuj laboras por la bonfarto de [...]

Kreskigu vian organizon, aliĝu al la sekva projekto de TEJO!


Vi probable iam vidis ke ni publikigas malfermajn alvokojn por serĉi homojn kiuj senpage vojaĝu al Esperanto-aranĝoj kaj estu trejnitaj pri specifaj temoj. Tiuj eventoj estas subvenciitaj de Eŭropa Unio per Erasmus+, programo kiun ni de jaroj uzas ĉar ni kunigas asociojn por prezenti projektojn. Ni nun proponas al vi aliĝi al prezentota projekto pri [...]



Leterojn ni ricevis el geamikoj



Estimata Sinjoro, Mi nomiĝas Gioia kaj mi skribas al vi el Italujo. Mia amikino el Bugarujo parolis pri via revuo, Turka Stelo, kaj ŝi sendis al mi la februaran numeron. Mi legis ĝin interese. Mi aprezis la artikolojn pro la varieco de la eligitaj temoj kaj pro la fluanta stilo de la pezoj. Mi tre ŝatis la ideon verki mallongan historion de la filozofio "popece". La rakonto pri Blaise Paskalo kaptas la atenton. Al mi plaĉus ricevi la aliajn numerojn de la revuo. Mi salutas vin Samideane



Gioia Albano, el Italujo

Slovaka prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de UN

Julius Hauser, el Slovakio

La 12-an de septembro 2017 en la stabejo de la UN en Nov-Jorko inaŭguriĝis la 72-a sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj (UN). La sesio havas la temon Fokusiĝi pri Homoj: Strebi por Paco kaj Deca Vivo al ĉiuj sur la Daŭripova Planedo.

La prezidanto de la 72-a sesio de la Ĝenerala Asembleo estas slovak ministro pri eksterlandaj kaj eŭropaj aferoj, Miroslav Lajčák * [lajčák], kiu anstataŭis la fiĝian diplomaton Peter Thompson kaj okupos ĝin unu jaron (ĝis la 17-an de septembro



2018).

Miroslav Lajčák diris en la malferma ceremonio, ke en la servoperiodo la Ĝenerala Asembleo klopodos en tri ĉefaj kampoj: homoj en la centro de la laboro, ekvilibro de interesoj, kvalito kaj travidebleco de laboro.

Lajčák, 54-jaraĝa, komencis sian karieron en la diplomatia servo de Ĉeĥoslovakio. Li studis en la moskva Ŝtata Instituto de Internaciaj Rilatoj kaj parolas naŭ lingvojn. Lajčák laboris kiel eksterordinara kaj plenrajtigita ambasadoro en Japanio, Jugoslavio, Albanio kaj Makedonio. Li estis ministro pri eksterlandaj aferoj en la jaroj 2009-2010; la ĝisnunan postenon de slovak eksterlanda ministro li okupas ekde 2012. Li laboris ankaŭ kiel plenuma direktoro de Eŭropa Servo por Ekstera Agado en Bruselo (2010-2012).

* *Dum la 101-a Universala Kongreson de Esperanto (Nitro, 23 – 30 julio 2016), Miroslav Lajčák estis membro de Honora Komitato.*



Lerneja ĝemeliĝo inter Istanbul kaj Kuŝimoto

Egawa Harukuni, el Japanio

La dua mezlernejo Koza en la urbeto Kuŝimoto ĝemeliĝis kun la dua mezlernejo de Istanbul por pli profundigi reciprokan amikiĝon per la forto de junuloj sub la amika rilato longa inter Turkujo kaj la urbeto Kuŝimoto pro la okazaĵo de "Ertugrul Firkateyni". La subskribo okazis la 15-an de septembro en la dua mezlernejo Koza kun ambaŭ lernejestroj. Ĉeestis entute 26 lernantoj el kiuj 12 venis el Istanbul. Ili alvenis la 11-an de septembro kaj anoncis jam en julio intencon viziti la urbeton Kuŝimoto, okaze de la datreveno de la mara akcidento de "Ertugrul Firkateyni" la 16-an de septembro. La lernejestro Aisu Kiŝi diris: "La amikiĝo inter Japanio kaj Turkujo komenciĝis antaŭ pli ol 100 jaroj en Kuŝimoto. Mi deziras la interkontaktadon por pli profundigi la amikecon." Kaj la lernejestro el Istanbul Konalu aldone diris: "Al ni bezonatas la interfluo de ambaŭ kulturoj por altigi la kvaliton de reciproka edukado, per kio ni deziras interkompreniĝi reciproke." Antaŭ ol la subskribo lernanto el Istanbul

prezentis la karakterizaĵojn de sia lernejo per lumbildoj, kaj poste ili gustumis japanan floraranĝon, tearton, arkarton, ktp. Kvankam la vizitantoj el Istanbul intencis viziti la lokon de la mara akcidento de "Ertugrul Firkateyni", tio bedaŭrinde ne okazis pro granda tifono baldaŭ atakonta la lokon. Sed anstataŭe ili vizitis la urbestron por esprimi siajn respektojn.

--- Mi tradukis el ĵurnalo Asahi kaj estas pluaj fotoj en la jena ligilo:

[http: www.asahi.com/articles/ASAK9G56B XK9GPXLB00N.html](http://www.asahi.com/articles/ASAK9G56B XK9GPXLB00N.html)

--- **Por pli da informoj pri la historio de "Ertugrul Firkateyni" vidu la julian numeron (#19) de Turka Stelo**



Antaŭ nelonga tempo, rangulo de Eŭropa Unio, unu el la multaj -laŭ kelkaj parazitaj, laŭ aliaj utilaj- "starigantoj" de la tuteŭropa prospero kaj feliĉo, stulte dezirante ofendi la sudajn popolojn de Eŭropo, diris publike kaj senhonte, ke tiuj popoloj ne progresas kontentige, ĉar ili ŝatas multe la vinon, la seksumon kaj la distron!

La aroganta dando, apartenanta al nova specio de la animala regno, tiu de la senanimaj, frostaj teknokratoj, montris ne nur sian idiotecon, sed ankaŭ tion, ke li scias nenion pri la origina, la vera homa temperamento, kiu iĝas multe pli klara, pli sensebla, sub blua, sennuba ĉielo, sub preskaŭ ĉiam brilanta suno, ĉe lazura, trankvila maro, alivorte en la medio kiun ĝuas la kulpaj suduloj de Eŭropo.



Tiu afero venigis en mian penson unu el la multaj antikvaj helenaj dioj, kiun mi multe amas. Mi parolas pri Dionizo, la dio de la krea forto kiu fekundigas la naturon. Krom ĉio alia, sub la efiko de la adorado de tiu dio, la helena spirito estis ege fekunda en la produkto de unikaj spiritaj kaj artaj faritaĵoj.

La naskiĝo de Dionizo estis aventura, simple ĉar li estis unu ankoraŭ ekster-edzeca filo de Zeŭso (Ζεύς), la reĝo de la dioj kaj de la tuta mondo. Tiun fojon la patrino, sekve la viktimo de la ĵaluza Hera (Ήρα), edzino de Zeŭso, estis alia belulino, Semela (Σεμέλη), reĝidino de Tebo (Θήβαι), filino de la potenca reĝo Kadmo (Κάδμος).

Kiam Semela, verŝajne naiva junulino, estis graveda, Hera iamaniere sukcesis konvinki ŝin, ke ŝi petu persiste de sia amoranto, sin prezenti antaŭ ŝi, en sia plena gloro kaj majesteco.

Zeŭso provis vane neobei al la peto de sia amatino, tamen ĉu ĉar li ne povis toleri la virinajn larmojn, ĉu ĉar li estis trenita de sia pasio al la belega amorantino, senpripense cedis, kaj sin prezentis antaŭ ŝi, en sia tuta dia sublimeco, tenante siajn terurajn fulmojn kaj ekjetante siajn same terurajn fulmo-brilojn.

Tio estis la venĝo de Hera, kiu bone sciis, ke mortemulo ne povas vidi la plej grandan dion en lia tuta grandiozeco. Fakte, kiam la dio prezentiĝis, la povra Semela, ekvidinte lin, tuj ekflamiĝis kaj horore mortis.



Zeŭso, helpe de la diino Gaja (aŭ Tera, Γαῖα), kiu tuj ĵetis sur la brulantan Semelan freŝajn, densajn branĉojn kaj foliojn de hedero, sukcesis savi la feton, kiun tuj li ensovnis en sian femuron, por ke ĝi estu sekura ĝis la momento de sia naskiĝo.

Dionizo, do, mirakle estis savita, mirakle estis naskita, kaj kiam tio okazis, laŭ ordono de Zeŭso, Hermeso (Ερμής), la dio-heroldo, kondukis kaj liveris lin al la nimfoj vivantaj sur la monto Niso (Νύσσα) de Kario (Καρία), apud Meandro (Μαίανδρος), la granda, akvoriĉa rivero kun la multaj kurbiĝoj.

Tie, sur la monto kun la sennombraj fontoj kaj la densaj sed mildaj, arbaroj, Dionizo pasigis siajn unuajn jarojn, ĝis kiam li viriĝis, vivante inter belegaj nimfoj, ĝuante la naturon kaj ties ĉiaspecajn bonaĵojn.

Kelkaj diris, ke li viriĝis inter la nimfoj Jadoj (Ύαδες), kiuj vivis en Dodono (Δωδώνη), kie estis la plej antikva helena sanktejo, fondita en la praa epoko de la unuaj Helenoj, la Pelasgoj (Πελασγοί).

Estas multaj ankoraŭ versioj pri tiu afero, ĉar ĉiuj deziris fari sia la tre amatan dion. Nu, ne gravas kie Dionizo pasigis siajn infanajn kaj junulajn jarojn, ĉar iom pli poste la gaja dio komencis traŭradi senhalte la tutan helenan teron, oferante al la homoj sian plej valoran donacon, la vinon, la dian produktaĵon de la vinberujo, kies kultivon li enkondukis en la mondon.



La vino estigas gajecon, veran ĝojon, ridon, ĝuon, plezuron, amon; tiele venas eroto, amoro, volupto. Ĉiu bonaĵo de la homa naturo estas vekata de Dionizo, la nelacigebla dio, kiu, tenante la tirson, sekvate de ruzaj kaj ludemaj satirusoj, orgipretaj bakĥantoj kaj Menadoj (Μαινάδες), traŭras la mondon, montrante al la homoj,

ke la vivo, vere malfacila afero, devas esti ne nur senĉesa lukto, ke la laciga, senfina laboro, la neelteneblaj ĉiutagaj suferoj, doloro, malĝojo, mizero, funebro ne povas esti la solaj diaj dotaĵoj oferitaj al la homaro. Dionizo montras, ke la homoj bezonas ĝojon, ridon, ĝuon, amon kaj amoron, ian guston de feliĉo, por elteni la malfacilaĵojn de la vivo.



La adorantoj de Dionizo partoprenis la orgiojn, tamen en la antikva helena lingvo la vorto “orgioj” (ὄργια) ne havis la konatan nuntempe signifon de kolektiva diboĉado pri diversaj malĉastaĵoj. La dionizaj orgioj estis religiaj ceremonioj neordinaraj, kaj nur en kelkaj lokoj la dio estis kultita sekrete en misteraj ritoj. Neordinara estis la adorado de Dionizo, ĉar la partoprenantoj de la strangaj ceremonioj ne staris kun respekto antaŭ altaroj, ili ne preĝis trankvile, sed, portante kronojn el vinber-branĉoj kaj tenante tirsojn kaj torĉojn, kuradis en la kamparo, kantante, dancante, festenante, solenante la dion de la ĝojo per ĝojo. Estis abunda vino, estis festenoj, ludoj, senfina distro, estis kolektiva amuziĝo, kiu helpis la homojn iom forgesi la ĉiutagajn problemojn, la suferojn de la vivo.

Tion oferas Dionizo, tion oferas la vino; la dio ne puŝas la homojn al diboĉado, al pigreco aŭ malpenemo, li montras nur vojon al la ĝojo, kiu estas necesa al la homoj tiom, kiom la spirado.

Dionizo montras la ĝustan vojon al la feliĉo, tamen li estas ne nur ĝuema fes-tenanto, li estas, same kiel la ceteraj dioj, brava kaj en ĉio utila. Ankaŭ li bata-las kuraĝe kun la ceteraj dioj kontraŭ la teruraj gigantoj, post kies submeto stabiligis la mondo, li batalas tute sola kaj venkas Tritonon (Τρίτων), la super-naturan maran monstron, li ne hezitas eĉ batali kontraŭ la obskuraj fortoj de la morto, en la suba mondo, kiujn li venkas kaj tiele elliberigas el la morto, elprenas de la malluma Hadeso (Αἴδης) kaj kondukas al la lumo sian malbonsortan patrinon Semelan.

Li ekamas multajn virinojn, tamen li enamiĝas pasie al Ariadna (Αριάδνη), la malfeliĉa reĝidino de Kreto (Κρήτη), li generas multajn idojn, li plene ĝuas sian dian gloron, sed neniam ĉesas instrui kaj helpi la homojn de la tuta mondo en la kultivado de la vinberujo kaj la produktado de la vino, en sennombraj di-versrangaj kvalitoj kaj varioj.

Tiu rangulo de E.U., la aroganta ofendinto de la suduloj ne miru aŭdante, ke mia plej amata dio, Dionizo, ĉiam vivas, ke li estas ĉie, ĉar li amas ĉiujn homojn, sudajn kaj nordajn, tamen li preferas la klimaton de sia naskiĝloko, la klimaton de la sudo, kie la homoj trinkas vinon, ne por ebriiĝi ĝis senkonsciigo, sed nur por rigardadi pli klare la belaĵojn de la mondo kaj vivo.

La ofendinto devas ekscii tion, kion milionoj da nordeŭropaj niaj gefratoj, bone scias, ke certaj paradizoj ne ekzistas, ke la bonkoraj, liberpensaj homoj, tiuj kiuj amas la ĝojon de la vivo, estas tiuj kiuj estigas paradizojn.

Do, mi konsilas lin trinki helenan, portugalan, italan, hispanan, francan vinon, lasi sian koron libera, laŭtvoĉe, plengorĝe, nehonteme kanti, danci sirtaki, fandon, tarandelon, fandangon, ion ajn, brakumi sukoplenan brunan virinon, lasi sin al la karesado de la suno, de la maro, de la muziko kaj tiam li konstatos, ke la tia ĝojo kaj plezuro, tute ne moderigos. lian laboremon kaj produkte-mon, tio nur faros lin homo pli ĝentila kaj pli bona.

La nova Tekstaro donas pli da Zamenhof, novajn kapablojn, kaj plian rapidecon!

La Tekstaro 3.1 provizas al la uzantoj plurajn plibonigojn. Al tiu unika korpuso de skriba Esperanto ĵus aldoniĝis gravaj pliaj verkoj de Zamenhof el pluraj periodoj. Modernigo de la interfacio nun permesas la samtempan serĉadon laŭ pluraj serĉesprimoj. Tio donas novajn eblojn por eltrovi, kompari, kaj kontrasti detalojn pri la uzado de Esperanto. Ĉio funkcias pli rapide, kaj la manierojn konstrui kompleksajn serĉesprimojn nun estas pli klara.

Tekstaro.com enhavas la plej grandan alireblan korpuson de skribita Esperanto. “La Tekstaro”, kiel la ĉiutagaj uzantoj ofte nomas ĝin, estas inter la plej gravaj projektoj, kiujn ESF komisiis. En la jaro 2002, la fama sveda gramatikisto Bertilo Wennergren komencis realigi la projekton. Bertilo estas la aŭtoro de PMEG, la plej grava libro pri Esperanta gramatiko kaj uzado. La Ondo de Esperanto nomis lin Esperantisto de la Jaro 2006, kaj UEA honoris lin pro lia estara agado.

>>>>
iru al
paĝo 20

1. Ĉu estas bone paroli du lingvojn?

Sufiĉas iri al la reto kaj tajpi, ekzemple, "bilinguismo infantile" (infana dulingveco) por trovi paĝojn kaj paĝojn pri la avantaĝoj de infana dulingveco aŭ ĝenerale plurlingveco.

Ĝis la '60-aj jaroj de la pasinta jarcento la situacio estis malsama, kaj ĉiuj sentis sin rajtigitaj konsili la gepatrojn paroli nur unu lingvon al beboj "por ne konfuzi ilin". En la komenco de la pasinta jarcento ĉiuj timis "nepurajn" civitanojn. Germanaj sciencistoj asertis ke homoj, kiuj parolas du lingvojn havas duoblan senton de lojaleco (ekzemple al Germanujo kaj al Rumanujo) kaj sekve ili havas personecoproblemojn kaj en la fino iĝas skizofreniuloj. Tio validis ankaŭ en Usono, kie oni deziris ke novaj enmigrintoj kiel eble plej rapide forlasu sian denaskan lingvon favore al la angla, kaj iĝu veraj usonanoj.

Oni memoras pri granda konferenco aranĝita en Luksemburgo en la 30-aj jaroj, en kiu partoprenis amaso da lingvistoj. Ili ĉiuj estis multlingvuloj, kaj la konferenco estis aranĝita tiel, ke ĉiu rajtas paroli en sia lingvo ĉar ĉiuj aliaj komprenas sen interpretado ĉiujn ĉefajn eŭropajn lingvojn. Do, ĉi tiu amaso da multlingvuloj sukcesis en la fino produkti rezolucion, kiu kondamnas multlingvecon kaj rekomendas instrui al infanoj nur unu lingvon.

En la lastaj 50 jaroj sekve de eksperimentoj komenciĝintaj en Kanado oni trovis, ke la antaŭaj asertoj estas senbazaj, kaj ke multlingvuloj havas avantaĝojn de multaj specoj ne nur en la lingva kampo.

Mi citas nur peceton el unu el la multaj paĝoj troveblaj en la reto: "Tio estas la konkludo de esploro...prizorgita de profesoro Jacques Mehler kune kun Agnes Kovacs de la Supera Lernejo de Progresintaj Studoj de Triesto: "La infanoj elmetitaj al du lingvoj, jam de la malgranda aĝo evoluigas lernostrategiojn pli flekseblajn. Je unu jaro ili kapablas lerni en maniero pli rapida kaj pli ellaborita rilate al infanoj samaĝaj, kiuj aŭskultas nur unu lingvon. Tute aparte, vivo apud patrino kaj patro, ekzemple, angla kaj itala aŭ hispana kaj germana, plibonigas ĉe la malgrandaj infanoj la plenum-kapablojn, kiuj estas esencaj procedoj por plenumi taskojn ne nur vortajn sed mastrumajn kaj planajn rilate al agadoj kaj kunordigajn de la unuopaj agoj."

Ĉiokaze, eĉ se la fakuloj pri dulingveco estus interkonsentintaj inter si por trompi la mondon, ni devus same agnoski, ke dulingveco almenaŭ estas pozitiva pri lernado kaj manipulado de lingvoj kaj certe ne estas malpozitiva pri aliaj kapabloj. Pensu ke tio

kongruas kun normala prudento.

Dulingvulo devas daŭre salti inter la du lingvoj, kaj kompari ilin kaj demandi sin kial diable en la itala oni devas diri "due donne sono belle" kun la pluralo ripetata 4 fojojn (due-donne-sono-belle) dum en la ĉina (denaska lingvo de multaj malgrandaj italoj nuntempe) oni diras multe pli simple: "due donna è bella". Tiu daŭra gimnastikado certe evoluigas la mensajn "muskolojn".



Konkludo por nefakuloj: plurlingveco estas IO BONA por via cerbo!

2. Ĉu estas bone paroli unu lokan lingvon kaj unu nacian lingvon?

Ne demandu kio estas dialekto. Neniu lingvisto en la mondo kapablas respondi. Ili ĉiuj provas savi sin per ŝerca esprimo: lingvo estas dialekto kun armeo. Pro tio ni uzas ĉi tie la neŭtralan esprimon "loka lingvo" por "dialekto" kaj "nacia lingvo" por la "oficiala landa lingvo".

Poemistoj, kiel ni scias, estas pli mensogaj ol tomoŝtonoj. Manzoni ne estas malsama. En la poemo "Marzo 1821" (Marto 1821) li diras, ke Italujo estas una d'arme, DI LINGUA, d'altare, di memorie, di sangue e di cor." (unu pro komunaj armiloj, LINGVO, religio, memoroj, sango kaj koro).

Nun, mi ne scias, kion tio signifis en la tempoj de Manzoni, krom deziro de difinita politika elito transpreni la lokon de la tiamaj regantoj, sed oni ne povas diri tion simple tiel. Oni provis diri, ke oni transprenas la postenojn nome de la unuecaj italoj, kaj tiel plu, romantike.

Ankoraŭ nun, malgraŭ tio, kion diras la Istituto Italiano di Statistica (kies laborantoj legis kaj ŝatis Manzoni-n), kiam mi havas okazon eniri, ekzemple, malsanulejon en la italaj urbetoj mi trovas, ke ĉiuj, inkluzive de kuracistoj kaj flegistoj, parolas inter si kaj kun la pacientoj la lokan dialekton aŭ la lokan variaĵon de la itala peze dialektigita. Oni parolas al vi en la loka itala malpli dialektigita se vi klare aperas, kiel iu kiu venas de alia loko.

Ĉiokaze mia gepatra lingvo, kiu ne estas la norma itala sed la dialekto de la vilaĝo de miaj gepatroj, ne estas pli proksima al la itala ol, ekzemple, la hispana.

Do, amaso da italoj de mia generacio parolas kaj lokajn dialektojn kaj la norman italan (en malsamaj proporcioj depende de la studoj, de la laboro, ktp.). Ĉu tio estas konsiderebla dulingveco? La respondo estas: Jes!

Ĉiuj esploroj faritaj pri la intelektaj kapabloj de italoj, kiuj nur parolas la norman italan (ĉar ili naskiĝis kaj vivis en atklasa familio), kaj de italoj, kiuj parolas kaj la dialekton kaj la italan, favoras la parolantojn de la dialekto. Eĉ en klasika eksperimento, en kiu estis tri grupoj esplorataj en Kampobaso (Campobasso): parolantoj de nur la norma itala, parolantoj de la norma itala kaj de la loka dialekto kaj parolantoj de la norma itala, la loka dialekto kaj la cigana, la plej mense flekseblaj estis la trilingvaj ciganaj infanoj. Kompreneble la filo de la apotekisto parolis la norman italan pli bone kaj la cigana infano pli malbone, sed mense la bildo estis tute alia.

Tio kompreneble aplikiĝas kaj al la lokaj italaj dialektoj kaj eĉ pli al la lingvoj parolataj de la novaj italoj. Se vi estas instruisto estu kontenta ke multaj el viaj lernantoj parolas hejme la ĉinan, la urduan aŭ la rumanan. Ne timu! Vivante en Italujo ili ne povas ne lerni la italan, sed la konservado de la propra lingvo estas ankoraŭ pli grava pro amaso da kialoj lingvaj kaj sociaj, pri kiuj ni ne parolu nun. Sciu, tamen, ke, se ni restas en la kampo de lingvoj, eksperimentoj en Nederlando montris, ke infanoj kiuj unue lernis la turkan en la unua klaso de la elementa lernejo kaj nur poste la nederlandan, post la fino de la dua jaro konis la nederlandan pli bone ol tiuj, kiuj komencis tuj per la nederlanda. Kial? Certe ne pro la propedeŭtikeco de la turka rilate al la nederlanda, sed pro tio, ke la lernado de la propra lingvo, kiun ili parolis hejme, donis al ili la senton de digno, kiu sufiĉis por kuraĝigi ilin alfronti la nekonatan nederlandan.

Konkludo por nefakuloj: paroli lokan dialekton aŭ fremdan lingvon kaj la italan ESTAS BONA por via cerbo.

3. Ĉu tio aplikiĝas ankaŭ al Esperanto?

Certe, Esperanto estas lingvo. Ĉu iu el vi kuraĝus aserti la malon?

Mi kredas, ke ne, sed se iu tamen troviĝas, li tuj elektu la armilon por la duelo.

Estante lingvo kiel ĉiuj aliaj lingvoj, ĝi produktas la samajn efikojn al la menso de la du- aŭ plur-lingvuloj. Eble vi memoras, ke kelkaj alineojn antaŭe mi diris, ke ju pli la du lingvoj estas malsamaj, des pli grandaj estas la efikoj al la cerbo de la dulingvulo.

Nun en la okazo de Esperanto kaj de la itala temas pri du lingvoj, kies profundaj funkcionieroj estas sufiĉe malsamaj. Se vi lernis Esperanton per normala kurso kiel plenkreskulo, kaj se vi uzis lernolibron de Migliorini aŭ de iu alia, vi perdis multon, ĉar oni provis kaŝi de vi la malsamecojn inter Esperanto kaj la itala.

La slogano estis: "*Esperanto estas facila, ĝi estas preskaŭ kiel la itala, vi certe povas lerni ĝin sen apartaj klopodoj!*"

Kiel vere funkcias Esperanto estis aŭdaca penso de Zamenhof, kiun li provis kaŝi de eŭropanoj, kaj ĝi restas kaŝita ĝis hodiaŭ krom se vi lernas Esperanton de la nasko. Oni ne vere povas trompi bebojn, kiuj lernas lingvon, ĉar ili havas amason da tempo por pensi kaj por alveni al la ĝustaj konkludoj.

Mi nur aludas al tio, kion faras esperantlingvaj beboj:

- kreado de novaj vortoj el normala Esperanto-materialo, kvankam la rezulto estas nekutime uzata de la parolantoj de Esperanto. Jen ekzemplo prenita el vera diro de vera infano: malmiksi (=dividi. Oni estis miksinta fruktosukojn de du specoj kaj la infano volis, ke oni nun malmiksu ilin);
- kreado de esprimoj potencie eblaj en Esperanto sed forme aŭ signife malsamaj je la normala Esperanto. Ekzemplo: lang(et)i (malmulte leki per la lango glaciaĵon);
- kreado de esprimoj potencie eblaj en Esperanto sed forme aŭ signife tre malsamaj rilate al la normala Esperanto uzata en la plenkreskula lingvo. Ekzemplo: Ne seĝu sur la divano (= ne sidu sur la divano).

Mi povus montri al vi centojn da tiaj ekzemploj. Esence beboj lernis jam je du jaroj, ke Esperanto estas aglutina lingvo, kie ĉio povas kombiniĝi kun ĉio kaj ke la nura limo estas limo de signifo. Infano, kiu devas konstante ludi inter tio kaj la itala, certe devas multe ekzerciĝi. Kiel vi tradukus: "Ĉu mi rajtas langeti vian glaciaĵon?"

(daŭrigota)

Fonto: http://www.esperanto.it/rivista/artikolo_view.php?id=58

Aktivu por la Aŭtuna E-renkonto (27.okt--4.nov) en la franca kastelo Greziljono

Dum la franca lerneja ferio okazos la 6a AŬTUNE, komuna E-feriado por infanoj, familioj, geavoj

Ni serĉas infanojn el lernejoj E-grupoj, kiuj ŝatas lerni, sporti, kaj prepari Halovenan feston.

Ni serĉas partoprenantojn kiuj proponas aldonan interesan programeron.

Ni serĉas novajn kantemulojn kaj muzikistojn por la koruso Interkant'.

Vidu la ĝisnunan programon: gresillon.org/autune skribu al kastelo@gresillon.org



Du Biletoj por Teatro

Dinko, la maljuna pensiulo, ĉiun posttagmezon venis en la parkon, sidiĝis sur unu el la benkoj kaj rigardis la homojn, kiuj pasis preter li. Estis gejunuloj, studentoj, lernantoj, aŭ viroj, virinoj, kiuj certe laboris en la proksimaj oficejoj. Ili ĉiuj rapidis kaj tute ne rimarkis Dinkon, kiu por ili verŝajne similis al monumento, silenta kaj senmova. Monumento, kiu bezonas nenion. Vere, post la pensiigo Dinko bezonis nenion, nek monon, nek renkontiĝojn kun konatoj, kiuj delonge forgesis lin. Liaj tagoj jam pasis malrapide, ligitaj unu al alia kiel longa peza fera ĉeno kaj ofte li demandis sin ĉu hodiaŭ estas marde aŭ merkrede.

Foje, kiam li silente sidis sur la benko en la parko, rigardanta la florojn en bedo, antaŭ li ekstaris junulo kaj afable salutis lin:

- Bonan tagon, sinjoro Milev.

Dinko mire alrigardis la junulon, kiu ŝajnis al li tute nekonata. "De kie li scias mian nomon – demandis sin Dinko."

- Vi ne rekonis min? – ekridetis la junulo.

- Ne – konfesis iom ĝene Dinko.

- Mi estas Vesko. La knabo, al kiu vi sen bileto permesis spekti la dimanĉajn teatrajn prezentojn.

Nun Dinko rememoris kaj antaŭ liaj okuloj aperis bildo, kiun li delonge forgesis. Antaŭ jaroj Dinko estis aktoro en la teatro. Tiam li ludis komikajn rolojn en preskaŭ ĉiuj teatraĵoj kaj same en la teatraĵoj por infanoj. Foje dimanĉe estis infana prezento. Antaŭ la enirejo de la teatro staris gepatroj kaj infanoj por eniri la salonon. Tiam estis kutimo, ke la geaktoroj bonvenigis la publikon ĉe la teatra enirejo kaj salutis la spektantojn per la vortoj: "Bonan venon kaj agrablan amuzon." Dinko estis ĉe la pordo kaj bonvenigis la gepatrojn kaj la infanojn, kiuj rapidis eniri. Kiam preskaŭ ĉiuj eniris, Dinko rimarkis, ke antaŭ la pordo staras nigrahara knabo kun grandaj malhelaj okuloj kiel olivoj.

- Kial vi ne eniras? – demandis Dinko la knabon.

- Mi ne havas bileton.

- Ĉu viaj gepatroj ne aĉetis por vi bileton?

- Ne.

- Kial?

- Miaj gepatroj ne estas ĉi tie. Ili laboras en Hispanio.

- Kaj kiu zorgas pri vi? – alrigardis Dinko la knabon.

- Mia avino.

- Ŝi certe povis aĉeti bileton kaj veni kun vi spekti la teatraĵon.

- Ŝi diras, ke ne ŝatas spekti infanajn teatraĵojn – respondis mallaŭte la knabo.

rakonto de Georgi Miĥalkov, el Bulgarujo

- Kiel vi nomiĝas?

- Vesko.

- Bone, Vesko. Eniru kaj spektu la teatraĵon – diris Dinko kaj mane enkondukis la knabon en la salonon.

- Ĉu sen bileto? – demandis Vesko mire.

- Jes, sen bileto. Mi permesas al vi.

La grandaj olivaj okuloj de Vesko, kiuj jam naĝis en larmoj, ekbrilis pro ĝojo.

Post du semajno Vesko denove staris antaŭ la teatro kaj Dinko denove permesis al li eniri sen bileto. Tio ripetiĝis kelkfoje. Certe Vesko ege ŝatis la teatron kaj deziris spekti ĉiujn infanajn teatraĵojn.

- Vesko, vi jam estas plenkreska viro – diris Dinko. – Kion vi laboras?

- Mi estas aktoro, sinjoro Milev, kaj nun mi ludas en la sama teatro, en kiu vi iam ludis. Kelkfoje mi vidas vin ĉi tie, en la parko, kaj hodiaŭ mi decidis alparoli vin kaj doni al vi du biletojn, por vi kaj via edzino, por ĉivespera teatra prezento. Mi ĝojus, se vi venus spekti min.

- Dankon, Vesko, mi nepre venos, sed bedaŭrinde mia edzino antaŭ kelkaj jaroj forpasis, tamen mi venos kun iu amiko – diris Dinko kaj eksentis larmojn en siaj okuloj, similajn al la larmoj, kiujn li iam, antaŭ multaj jaroj, vidis en la grandaj olivaj okuloj de Vesko, kiam li staris sola ĉe la teatra pordo.

Julian Modest

Fonto: **Bulgara Esperantisto #2/ 2017**



INTER-FEST Sukcesa kaj Impona

De la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2017 en kroata urbo Bjelovar okazis unu el la plej imponaj eŭropaj Esperanto-festivaloj. En la festivalo partoprenis geesperantistoj el pluraj landoj: Rusio, Francio, Germanio, Hungario, Pollando, Litovio, Suda Koreujo, Serbio, Bulgario kaj aliaj.

La ĉeftemo de la festivalo estis: "Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo". Pluraj kaj tre allogaj estis la festivalaj programeroj. En la unua tago



la partoprenantoj ekskursis al urbo Durdevac, kie ili vizitis la muzeon en la fortikaĵo "Stari grad". La saman tagon posttagmeze en la urba muzeo de Bjelovar estis prezentita la ekspozicio "Unua alfabetlibro", en kiu estis alfabetlibroj el diversaj landoj en la mondo. La ĉeestantoj trarigardis same la ekspozicion de infanaj pentraĵoj, pentritaj de infanoj el multaj landoj.

La solena inaŭguro de la festivalo okazis la 6-an de aŭgusto en la urba kulturdomo. Estis riĉa arta programo, en kiu partoprenis kroataj kaj Esperantaj muzikantoj kaj estis projekciita la filmo "Hejme floras, certe, sed..." – emocia Esperanta filmo pri Hiroŝimo.

La festivalaj programeroj estis tre multaj kaj tre interesaj; koncertoj de la konata Esperanta verkisto kaj kantisto Mikaelo Bronŝtejn el Rusio, koncertoj de la fama kroata kantisto, muzikanto, esperantisto



Neven Mrzlečki, koncertoj de la franca duo Francoise kaj Dede el Francio, koncerto de la 19-jara esperantistino Blanka Laslo el Serbio. Estis prezentitaj pluraj Esperantaj libroj:

"Oklingva medicina enciklopedia vortaro", kunmetita de la kroata esperantisto d-ro Jozo Mareviĉ, la novelaro "Fronto aŭ dorso" de Julia Sigmond, "Elektitaj tekstoj pri internacia juro" de d-ro Ivo Lapenna, "La nigra patrino tero" – romano de la juna kroata verkisto Kristian Novak, tradukita en Esperanto de Josip Pleadin, "Brakumi la mondon per Esperanto" de

raportas Georgi Miĥalkov, el Bulgario

Nikola Uzunov, "La viro el la psinteco" – Esperanta novelaro de Julian Modest k.a.

Pri la festivala temo prelegis Tomasz Chmielik el Pollando, Neven Kovaĉiĉ el Kroatio kaj Georgi Mihalkov el Bulgario. En siaj prelegoj ili substrekis, ke la eŭropa kultura kunfandiĝo estas plurtavola kaj natura proceso, en kiu gravan rolon ludas same la internacia lingvo Esperanto. En la urba katedralo de Sankta Teresa de Avila sacerdote Rikard Patafta okazigis solenan celebradon de esperantlingva Sankta Meso. Ĉeestis geesperantitoj kaj pluraj urbanoj. En la urba kultura kaj multimedia centro estis projekciita la Esperanta filmo de la franca filmisto Dominique Gautier "Esperanto", kiu prezentas vojaĝon tra la mondo. La filmo traktas la historion de Esperanto kaj intervjuas plurajn personojn pri Esperanto.

La 6-an de aŭgusto en la urba kulturdomo okazis granda nacia koncerto, kies titolo estis "Bjelovar per koro kantas". En la koncerto partoprenis anoj de Kultura scioto "Ivan vitez Trnski" de Nova Raĉa, Kultura societo "Veliko Trojstvo" de Veliko Trojstvo kaj Kroata metiista kaj laborista kultura societo "Golub" de Bjelovar.



La lastaj tri tagoj de la festivalo estis dediĉitaj al ekskursoj. La partoprenantoj vizitis Veliki Gradevac, kie trarigardis la memorĉambron de la konata kroata verkisto Mato Lovrak, aŭtoro de libroj por infanoj. Du el ili estas tradukitaj en Esperanto kaj la libro "La trajno en la neĝo", tradukita de Josip Pleadin estis proklamita "Infanlibro de la jaro" dum la Universala Kongreso en 2016 en urbo Nitra.

La sekvan tagon, la 10-an de aŭgusto, estis ekskurso al urbo Zagrebo kaj al Gornja kaj Donja Stubica. En Gorna Stubica en 1573 okazis la granda Kamparana ribelo kaj la anoj en la festivalo trarigardis la monumenton, dediĉita al la perintaj ribelanoj. Oni vizitis Kumrovec, la naskan vilaĝon de Josip Broz Tito. La tria ekskurso estis en urbo Varaĵdin kaj en la impona kastelo Trakoŝĉan.

Inter-Fest estis bonege organizita kaj ĉiuj partoprenantoj longe rememoros la belegajn tagojn, kiujn ili pasigis en pitoreska urbo Bjelovar.



Forpasis Marjorie Boulton

La 30-an de aŭgusto, en la aĝo de 93 jaroj, forpasis Marjorie Boulton, unu el la plej ŝatataj Esperantaj verkistoj, honora membro de UEA.

La verkista kariero de Marjorie Boulton komenciĝis en 1949, kiam ŝi havis 25 jarojn, per poemaro en la angla lingvo. Post tio ŝi publikigis tridekon da libroj en plej diversaj ĝenroj. Poemoj, prozo, teatraĵoj, literaturaj studoj en la angla kaj en Esperanto aperis el ŝia plumo, sed ankaŭ amuzaj artikoloj en *Monato*. La anglalingva publiko tutmonde konas ŝin kiel seriozan literatur-scieniston, la esperantlingva – same tutmonde – ankaŭ kiel poeton kaj grandan amikon de katoj.

En artikolo aperinta en *Libera Folio* en 2005 Baldur Ragnarsson skribas: “Marjorie Boulton estas unu el la plej produktivaj kaj ŝatataj verkistoj en la internacia lingvo. Ŝiajn literaturajn verkojn ecigas subtila arto, sincero kaj humanismo. Kaj per siaj edukaj verkoj ŝi scias instrui per idea riĉo kaj amuzi per ĉiam ĉeesta sprito.”

En omaĝa parolado okaze de transdono de la Esperanto-Kulturpremio de Aalen al d-ro Marjorie Boulton en 1998 Baldur Ragnarsson diris:

En sia unua poemo en Esperanto, *Marborda ŝtono*, verkita en 1951, Marjorie, la poetino, tiam 27-jara junulino, priskribas sian iradon sur marbordo en mizera anima stato, kiel okazas ja ne malofte en junaj vivoj. Ŝi hazarde rimarkas ovoforman ŝtonon inter la rokoj kaj ĝin prenas, la ŝtono viviĝas en ŝia mano, kaj pro ia mistera procezo ŝi sentas strangan bruon de “estonta fido”, de “espero nova”. La juna poetino sentas transformiĝon en sia animo, transformiĝon el mizero al fido, precize tian transformiĝon sur tiu stadio en sia vivo, kiam ŝi decidis fordoni sin al arta kreado en la internacia lingvo, Esperanto.

Tiu transformiĝo portis en si kreskigan forton kiu rapide produktis abundajn kaj variajn fruktojn: kvar

jarojn poste aperis ŝia unua poemaro en Esperanto, *Kontralte*, ampleksanta malpli ol 273 paĝojn da poemoj, poemoj eksterordinaraj en la Esperanta literaturo, poemoj de virineco en la plej profunda senco, poemoj, kiuj vekus furoran reagon eĉ nun, se tiaj aperus en vaste konata nacia lingvo. Pasis ankoraŭ kvar jaroj, tiam sekvis nova poemaro, simple titolita *Eroj*, ĉi tiu ampleksanta 349 paĝojn da poemoj, poemoj de plua evoluo de la poezia kreopovo de la poetino, poemoj esplorantaj novajn, pli vastajn temojn sur granda skalo. La fido, kiun simbole vekis la magia marborda ŝtono de juneco, ne estis ia efemera iluzio, ĝi pruviĝis la fakta vero mem.

En la lastaj jaroj Marjorie Boulton pro sia alta aĝo kaj pro malsano ne ofte povis viziti Esperanto-aranĝojn. En 2015 ŝi tamen ĉeestis la Universalan Kongreson en Lille, mallonge rakontis pri siaj memoroj al la granda publiko, kiu kolektiĝis en la libroservo, kaj subskribis kelkajn librojn.

Pli da informoj kaj ligiloj al pluraj ŝiaj verkoj troviĝas en la retejo “**Originala Literaturo Esperanta**”:
<http://esperanto.net/literaturo/autor/boulton.html>

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2017/08/31/forpasis-marjorie-boulton/>



Zamenhofa Stilo

La pura zamenhofa stilo -
tion ni celas; ni disputas
dum sur la muro en trankvilo
la Zamenhof-portreto mutas.
Dum al celo ĉiam sama
ni strebas, argumentoj vundas;
pro amo al la lingvo ama
etaĵ malamoj ekabundas.

Kelkloke estas malfacilo
pri iu stilopunkto duba;
unu detalo inter milo
ŝveligas sin ĝis prem' inkuba,
timigas nin kaj nin sufokas.
Dum ĉiu sin proklamas prava,

krioj kaj kontraŭkrioj mokas
en vasta nigra vako kava.
La paĝo, frazo, eĉ la vorto
ĉe polemiko perdas sencon;
sed antaŭ dummilita morto
Zamenhof kreis precedencon.
Kie du homoj malkonsentas
sed restas mildo kaj ĝentilo,
jen ambaŭ certe elokventas
laŭ pura zamenhofa stilo.

Se fraton frat' pardonas ame,
aŭskultas pacience plendon,
se iu suferant' sendrame

poemo de Marjorie Boulton

silente glutas la ofendon;
se iu serĉas ĉe alia
bonajn motivojn en humilo,
jen, ĉe konflikto opinia,
la pura zamenhofa stilo.

Se iu vivas en mizero
kiu kapablus esti riĉa,
sed per servado kaj ofero
sin igas fakte pli feliĉa,
se tiu dum la viv' persistas,
hardita, dediĉita ilo,
en tia hom' jam ekzistas
la pura zamenhofa stilo.

Jen, unu vivas en angoro,
sed spitas riskojn kaj instruas;
unu per ada trolaboro
sin mem por nia cel' detruas.

Jen oferita karier';
jen, por principoj, sin-ekzilo;
kie ajn flamas sin-of'er' -
jen pura zamenhofa stilo.

La vortoj estas vortoj nur,
facila vento, nur kutimo,
pli gravas viva stilopur',
la gramatik' de grandanimo;

se du pri stilo ekdebatas,
ĉiu sin konas erarpova,
kaj la alian daŭre ŝatas,
jen jam la stilo zamenhofa.

Ĉe nia Nun kaj Tie-ĉi,
la Estonteco lumas jam,
la tuthomar' en harmoni',
revo de zamenhofa am';
ni strebu al la rev-plenum'.
En ĉies koro restu brilo
de la fratiga amo-lum'-
plej grava zamenhofa stilo.

**Marjorie Boulton, laŭ Radio Roma-
Esperanto**

Fonto: El afiŝo de Antonio de Salvo
en facebook'o

[https://www.facebook.com/
groups/esperanto.grupo/
permalink/10155417232790289/](https://www.facebook.com/groups/esperanto.grupo/permalink/10155417232790289/)

Kial oni ne lernas Esperanton?

La plej multaj homoj trovas Esperanton
neinteresa. Ne indas trudadi la lingvon al tiuj,
kiuj ne volas aŭdi pri ĝi. Prefere ol propagandi,
indas mem lerni la lingvon bone kaj uzi ĝin en
internaciaj kontaktoj, skribas Liu Xiaozhe.

Komencantoj de Esperanto ofte fervore
propagandas tiun lingvon al ĉirkaŭaj homoj. Ili sentas,
ke tiu magia lingvo por ili malfermis la pordon al la
mondo. Do ili esperas, ke ĉiuj aliaj homoj ĝuos tiun
raraĵon.

Sed tre ofte ili ankaŭ senesperigas.

Oni trovas, ke multaj informitoj, eksciinte pri la
ekzisto de la internacia lingvo, nur surpriziĝas pri la
artefareblo de homa lingvo, sed ili tuj forgesas ĝin
turninte la atenton al alia afero. Iuj scivolaj forlasas la
lernadon post nur kelkaj lecionoj.

La komencanto denove estas la sola lernanto en la
loko.

Kial? Kial oni ne varme brakumas tiun bonan
lingvon kun bela interna ideo? Kial ilin ne interesas tiu
lingvo, kiu povas forigi la lingvan baron en la
internacia komunikado?

La kaŭzo fakte estas simpla: multaj homoj tute ne
interesiĝas pri la lingva problemoj! Por ili, krom sia
gepatra lingvo, la aliaj lingvoj, per kiuj oni povas
interflui kun nesamlingvaj homoj, estas tute superfluaj
kaj nenecesaj!

La amatoroj kaj interesatoj de iu afero inklinas
opinii, ke ilia celitaĵo estas la plej grava afero. Multaj
subtenantoj de Esperanto ne konscias, ke por aliaj
homoj estas aliaj pli gravaj aferoj ol la lingva
problemo.

Jes, Esperanto alportas al vi ĝojon kaj ĝuon, sed
multaj homoj ankoraŭ baraktas por la manĝaĵo kaj
vestoj, do ili ne havas tempon kaj energion pripensi la
bezonojn je spirito.

Jes, lokaj esperantistoj multe helpas vin dum via
vojaĝo en aliaj landoj, sed multaj homoj eĉ neniam

foriras el siaj naskiĝaj vilaĝoj
aŭ urbo.

Jes, per Esperanto vi
povas konatiĝi kaj interflui
kun homoj en diversaj landoj,
sed multaj homoj kontaktas
aliajn nur en la ĉiutagaj vivo
kaj laboro, ne havante aliajn
konatojn eĉ en sia urbo.

Jes, per Esperanto vi povas legi informojn el
diversaj partoj de la mondo, sed multaj homoj ne
povas aŭ ne volas legi ĵurnalon eĉ en sia nacia lingvo.

Jes, Esperanto estas lingvo kun bela ideo, kaj
partopreni en la Esperanta movado estas kontribuo al
pli bela mondo. Sed multaj homoj opinias, ke estas
multaj aliaj aferoj pli gravaj ol la lingva problemoj en la
mondo, ekzemple, malriĉo, malsato, medio, akva
riĉfonto, klimato, homaj rajtoj, ktp..

Iuj homoj ne lernas Esperanton, ĉar ili neniam
aŭdis pri ĝi. Sed plejparto de homoj ne havas
intereson al Esperanto, eĉ jam detale informite pri tiu
lingvo!

Ĉiuj havas propran intereson. Altrudi la sian al alia
estas ne-efike kaj ofte malŝatate. Estas tute normale,
ke oni ne interesiĝas ĉe Esperanto kaj ne lernas ĝin.

Do, kion ni faru? Ĉu ni ĉesu propagandi
Esperanton al aliaj homoj?

Propagandado nepre estas farinda laboro, kiu
povas varbi latentajn lernantojn. Sed se oni ne
interesiĝas pri nia lingvo, ni ne daŭrigu proponi ĝin al
ili. Kaj ni ne tro senesperigu. Ĉar ne ekzistas afero, kiu
povas altiri ĉiujn homojn. Sufiĉas, ke ĉirkaŭaj homoj
sci pri Esperanto, kaj ili mem elektu ĉu lerni aŭ ne.

Fakte, estas pli efika rimedo propagandi la lingvon
Esperanto, nome, ni mem lernu kaj uzu ĝin en la
internaciaj kontaktoj. Vidinte, ke Esperanto estas utila,
la veraj interesatoj lernos ĝin. Ni influu aliajn homojn
per nia agado, sed ne per senĉesaj ripetitaj vortoj. Kiel >>>



Solis (Liu Xiaozhe), el Ĉinio

Esperanto denove dum Woodstock!

De la 3-a ĝis la 5-a de aŭgusto jam la duan fojon okazis, dum la granda kaj fama Festivalo Woodstock ĉe la pola/germana landlimo, Multkultura Vilaĝo Esperanto.

La projekton monsubtenis UEA kaj bonkoruloj, kiuj komprenis ĝian unikecon, direktitan al neimagebla amaso (duonmiliono!) da junularo: ideema, entuziasma, kiu jam 23-foje ĉeestis la senkoston rokmuzean festivalon, baptitan de ĝia organizanto Jurek Owsiak per la vortoj: Amo – Amikeco – Muziko.

Nia 20-persona teamo de mateno ĝis vespero laboris por informi kaj reklami pri Esperanto. La rikolto povas esti abunda, ĉar kursojn de Esperanto, gvidatajn de Stano Marček 3-foje po tage, allogis grupojn de entuziasmoj, kiuj dum 2-horaj lecionoj ellernis po 6-7 lecionoj! Alia furaĝo estis prelegoj de Kamil Dudkowski pri malmultekosta vojaĝado tra la mondo. La temo estis planita kiel kampanjo por Pasporta Servo, sed – ne venis permeso fari tion. Kamil, fervora vojaĝanto, kiu malgraŭ juna aĝo jam vizitis pli ol 70 landojn, allogis eĉ dufoje po tage

interesiĝantojn pri veturado "preskaŭ sen mono". Nia informa agado ĉe la stando estis pliriĉigita per kolektado de subskriboj por Paca Nobelpremio al la organizantoj de la festivalo. La rezulto estis pli ol dumil subskriboj! Gastojn en nian tendon invitis kantante JoMo kaj knabinetoj el la grupo Esperanto-Familio. Valoran helpon donis reprezentanto de TEJO Alessandro Bonfanti. Ili ambaŭ kun JoMo montris internaciecon de la lingvo, parolante kun la gastoj, interesigante ilin pri lernado de Esperanto.

Senlace laboris ĉe la stando ankaŭ nia plej maljuna teamano Kazimierz Krzyżak, iniciatinto de la projekto. Mi devas substreki rolon de la plej laboremaj viroj en nia tendumejo: Andreo Sochacki kaj Michał Sidorowicz. Ne mezurablebla estas valoro de la kontribuo de Stano Marček, kiu kunportis imponan informan kaj edukatan materialon kaj instruis po 6 horoj tage! Pri mastrumado okupiĝis Ata Kaczanowska, kun helpo de junuloj, zorgantaj pri aĉetado de manĝproduktoj kaj tagmanĝoj.

Halina Komar



Fotoj: Andrzej Sochacki

**Fonto: Esperanto Aktuell
2017/4**

>>> oni admonas iujn religi-anojn: ne nur deklaru vian religion paca, sed ankaŭ agu pace!

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2017/06/23/kial-oni-ne-lernas-esperanton/>

EL LA UNUA PARTO - TAŬO



28

Tiu, kiu scias sian virecon
kaj konservas sian inecon,
estas la ravino de l' mondo.
Se li estas la ravino de l' mondo,
ne forlasas lin la eterna VIVO,
kaj li fariĝas denove kiel infano.

Tiu, kiu scias sian purecon
kaj konservas sian malforton,
estas modelo por la mondo.
Se li estas imitinda modelo por la mondo,
ne foriĝas de li la eterna VIVO,
kaj li returniĝas al nefariteco.

Tiu, kiu scias sian honoron
kaj konservas sian honton,
estas la valo de l' mondo.
Se li estas la valo de l' mondo,
sufiĉas al li la eterna VIVO,
kaj li revenas al la simpleco.

Se la simpleco estas disa, oni havas „uzeblajn“
homojn.
Se la saĝulo uzas la simplecon, li fariĝas la
mastro de l'oficistoj.
Tial: Granda formado
ne bezonas pritranc̄on.

Rimarkoj de Anniespera

En la originalo la vorto por pureco "bai" (fonetike) signifas
blankecon. La vorto "malforto", en la originalo
"hei" (fonetike), signifas nigrecon. Se la simpleco estas disa,
oni havas "uzeblajn" homojn. (Vilhelmo) En la originala
teksto la vorto "qi" (fonetike ne signifas "homojn", sed ilo aŭ
vazo.

Vd. el s-ro Wang Chongfang:

"Kiam la simpleco (pu) estas disrompita, ĝi turniĝas en ilojn."

"Se la saĝulo uzas la simplecon, li fariĝas la mastro de l'
oficistoj." (Vilhelmo) Laŭ la originala teksto devus esti "la
disa simpleco".

Simpleco, la ĉina vorto "pu" estas nesulptita peco da ligno,
Laocio volonte uzis la vorton kiel metaforon por simpleco.
(laŭ Wang Chongfang)

29

Voli konkeri kaj trakti la mondon;
mi spertis, ke tio malsukcesas.
La mondo estas sankta aĵo,
kiun oni ne traktu.
Kiu traktas ĝin, tiu ĝin fuŝas,
kiu volas firmteni ĝin, tiu ĝin perdas.
Tial la aĵoj aŭ antaŭeniras aŭ sekvas ion,
kaj elspiras varme kaj blovas fride,
estas aŭ fortaj aŭ malfortaj,
aŭ naĝas supre aŭ falegas.
Tial la saĝulo evitas
la troon, la tro multan, la tro grandan.


Rimarkoj de Cezar

Mi lernis kaj konkludis el tiu ĉapitro, ke oni traktu nenion kaj
neniun, ĉu bone ĉu malbone. Ĉiuj kaj ĉio havas sian propran
naturon, sian propran evoluon, tiun mi ne ĝenu. Jen la
kaŭzo, kial avangardaj iluzioj ofte havas terurajn sekvojn.
Oni ne devigu socion aŭ individuojn al certa formo de la
feliĉo, ĉiu el sia propra naturo mem serĉu kaj trovu sian
feliĉon. Kion helpu avangardoj, se la individuoj de amaso ne
mem eltrovas, kion ili bezonas? La feliĉon oni ne povas
ordoni kaj ne donaci. Karitato kaj almozoj nur tie necesas,
kie ekzistas granda socia maljusteco.

Kaj ankaŭ tion mi rememoris el tiu ĉi ĉapitro: la saĝulo ne
celas esti la plej forta, la plej bela kaj la plej bona, jam tio
estas ĝeno al ĉiuj tiuj, kiuj ne estas tiel fortaj, ne tiel belaj kaj
ne povas esti tiel bonaj aŭ sanaj, ĉar mankas al ili la decida
antaŭkondiĉo, la optimuma ekonomia bazo por esti
perfektuloj. Ni vivas en neperfekta socio, kiel ni do povus esti
perfektaj? Tio ne eblas. Krome: se mi venkus, aliaj
malvenkus. Tial Laocio instruas, ke ni rezignu pri ĉio, kio
estas tro: tro da riĉo, tro da granda, tro da venkavido, tro da
egoismo... tro da kio ajn. Ni estu prefere modestaj kaj ne
senmezuraj, sen rampi pro tio surgenue. Ni estu
memkonsciaj, rezistemaj al la malbono kaj neagemaj je ĉio,
kio ĝenas la naturan iron de l' mondo, kontraŭ tio, kio ĝenas
la Taŭon.

Kaj ankaŭ tion mi ekkomprenis en la ĉapitro, ke neagado kaj
neagemo povas enteni tre aktivan dialektikan flankon: la
pasivan reziston kontraŭ ĉio, kio detruas la naturan iron de l'
mondo. (cez).

(daŭrigota)



(13)

Sola en la vastega magazeno, Katarina decidis ne telefoni tuj. Tiuj teroristoj tute certe volas, ke la eksplodo okazu iam dumtage, kiam estos multegaj homoj en la proksimaĵo. Tion ili faris jam dufoje,

tion ili certe ree faras. Sekve, ne estas urĝe informi la policon aŭ la Sekuriksan centran oficejon. Ju pli malfrue ili ekscios pri la afero, des pli longe ili lasos Rikardon trankvila. Kaj la komforton de tiu aminda ŝafido oni plej serioze atentu.

Samtempe, disaj sentoj interbatiĝis en la koro de Rikardo, dum li paŝis de konstruaĵo al konstruaĵo laŭ la papero, sur kiu priskribiĝis la sinsekvo de liaj noktaj taskoj. "Espereble ŝi atendas antaŭ ol voki la policon", li pensis, timante la momenton troviĝi vid-al-vide de policano, kiun eble interesos lia laborpermeso. Sed la kontraŭa penso lin okupis same: "Nun, tiu aminda kuraĝulino troviĝas tute sola en tiu danĝera loko, kie eksplodo riskas okazi de minuto al minuto. Espereble ŝi vokos la policon tuj, por ke ili rapide liberigu ŝin de tiu plej timinda danĝero."

Ankaŭ sur alia kampo la knabo havis sentojn reciproke kontraŭdirajn. "Kial mi faras ĉi tiun rondiradon? Kial mi ne malaperas tuj? Mi povus reiri hejmen petveture. Tiel la polico ne scius pri mia nevera laborpermeso. Kompreneble mi ne ricevus la

monon de Sekuriks, sed kiom valoras mono, se oni ekscios, ke ĝi estis ricevita per nehonesta rimedo? Jes, sed petveturi estas riska afero. Oni povas atendi dum horoj, kaj neniu aŭto haltas. Kaj cetere mi malŝatas peti, mi neniam petveturis, mi ne estas tia homo, kiu sukcesas en similaj aferoj. Kaj krome la pago de Sekuriks estas grava. Valoras atendi ĝin. Ne, ne. Mi ne foriru. Mi faru mian laboron plej zorgeme. Cetere, se mi malaperus, mi perdus Katarinan."

La penso pri Katarina redonis al li kuraĝon. La laborpermesa problemo iĝis eta, eta. Kaj eĉ se la polico malkovros lian fi-agon, eĉ se oni enŝlosos lin en malliberejo, Katarina venos viziti lin, alporti al li oranĝojn...

Kaj post tiu penso, kiu igis lin rideti, teruro ree kaptis lin. Sed kion fari? Kiam oni sentas sin senpova, oni turnas sin al Dio. "Dio, Dio mia," li mallaŭtis, "mi petegas vin, faru, ke Katarina tuj voku la policon, ke tiu eksplodaĵo ne ekfunkciu, dum ŝi troviĝas tie sendefende."

Tiel plu iris Rikardo, kaptata jen de timo, jen de espero, jen ree time tremanta, jen repensanta pri sia amo... Dancis la sentoj en li dancon plej ofte ne plaĉan. Kaj li paŝis plu kaj plu sub la luno.

(daŭrigota)

105-a Universala Kongreso : Montrealo 2020 !

Le 105^e congrès mondial d'espéranto aura lieu à Montréal !



Jes, vi povas kredi viajn okulojn, kaj denove jes, tio estas oficiala : la UK-2020 ja okazos en Montrealo ! Dum la ferma ceremonio de la UK en Seulo UEA anoncis ne unu, sed du sekvajn universalajn kongresojn : Lahti (Finnlando) en 2019 kaj Montrealo en 2020. La montreala Loka Kongresa Komitato, kiu havis la kuraĝon inviti kaj laboregos dum la venontaj tri jaroj por sukcesigi tiun ĉi, certe, historian eventon, respondas la demandojn !

Fonto: Revuo "La Riverego" - Somero 2017 Esperanto-Societo Kebekia Jaro 33, No 126-127

Ŝercoj



Du viroj renkontiĝas.
 — Bonvolu pruntedoni vian nigran kostumon, ĉar mia avo mortis!
 — Jes, kompreneble. Mi pruntedonos ĝin al vi.

Post kelkaj semajnoj ili denove renkontiĝas.
 — Estus bone, se vi redonus mian kostumon.
 — Sed kiel? Ĝi estis enterigita kun mia avo.

En gimnastikejo viro demandas trejniston:
 — Kiun gimnastik-maŝinon mi uzu por ke tiu bondulino enamiĝu kun mi?

— Sinjoro, vi uzu kla bankaŭtomaton.

— Kio estas la absoluta klaĉo?

— ???

— Kiam mutulo diras al surdulo, ke blindulo vidis kuri la senpiedulon.

— Kiel plaĉas al vi la lerneja vivo?
 Demandas panjo al sia fileto post la unua lernotago.

— Terure!
 la knabeto preskaŭ esploras.

— Ni devas fari la taskojn, sed la instruistino ricevas salajron por tio.

Post dimanĉa tagmanĝo viro kuŝiĝis sur kanapon por dormi. Pasis duonhoro, kaj sia edzino vekas lin:

— Karulo, mia patrino falis en la puton. Ŝi estas morta, en la akvo.

— Ne estas problemo, mi ĉiam trinkas nur kranakvon.



Krucvortenigmo



Horizontale

1. Transportsistemo, funkcia laŭ relo/rado-principo kun sekuriga sistemo pro atingebla granda kineta energio; Estr' de vivejo de la plej malnovaj monaĥaj ordenoj.

2. Eldiro de tiu, kiu malutilas al ies honoro aŭ reputacio, komunikante mensogajn sciigojn pri ties karaktero, konduto ktp.

3. Homo, kiu pasie deziras kolekti sian monon; Konjunkcio esprimanta diferencon por enkonduki la duan parton de neegaleca komparo.

4. Bohema danco; Prefikso almetebla al numeralo aŭ kvantesprima vorto, kun la sama disdivida kaj ripeta senco.

5. Pseŭdosciencia teorio, bazita sur la tri postulatoj, ke ekzistis arja raso, ke ĝi estis supera al la ceteraj, kaj ke ĝiaj nunaj reprezentantoj estas la ĝermanoj.

6. Konjunkcio por enkonduki diferencon inter du ebloj, ecoj ks; Metala drato aŭ drataro, kiu servas kiel malfermita oscilcirkvito, por ricevi aŭ elsendi radiosignalojn; (inverse) Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj.

7. (radiko) Skrapo per specialan ilo substancon ne tre malmolan, por ĝin dispecetigi, pulvorigi aŭ flokigi; (inverse duono de) Rostita pantranĉo;

8. (inverse) Sufikso prezentanta la plenumanton de procezo pli frue ol ties plenumiĝo; E-Eŭropa regno kun

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												

ĉefurbo Kievo.

9. En la fabeloj, giganto infanmanĝanta; Etend' de iu aŭ io, mezurata laŭ la plej granda dimensio.

10. Malklara, kiel la malaltaj notoj de gamo; kvazaŭ sufokita; Angulo de 90° aŭ kvarono de tuta revoluo.

Vertikale:

1. Mallonga frazo uzata en reklamado aŭ vorto, kiun oni presas izole kaj fronte de gazeta kolumno, kaj kiu resume prezentas gravan informon.
2. Konsonanto, voĉa frikativa labialo; Mola kaj tre movebla muskola organo, situanta en la buŝo, esenca organo de la gustumado, ĉefa ilo de la glutado kaj, ĉe homo, de la parolkapablo.
3. Efektive ekzistanta kaj kontrolebla, kontraste kun: imagata, ŝajna; Ag' de iu, kiu enspirante, entiras likvon aŭ fluidon en la buŝon aŭ nazon.
4. Kreo de elektrono kaj pozitrono el gama-kvantumo (sen la finaj du literoj); (inverse) Konsonanto, senvoĉa ploziva dentalo.
5. Mr. Tot aĉetas mil ... (sen lo);
6. La unua silabo de urbo en Krimeo; Ag' de tiu, kiu komencas batalon kontraŭ iu aŭ io.
7. Kolo sen ko; Ne aranĝita aŭ dismetita laŭ regula kaj oportuna dismeto de objektoj en ilia ĝusta loko (ne uzante mal).
8. Finiĝanta per akuta kaj pika ekstremo;
9. Simpatia inklino al iu; Finaĵo de verbo, uzata kiam oni esprimiĝas pli frue ol la aludata procezo (t.n. futuro); Morfemo signifanta instrumento aŭ aparato.
10. Kultura prezentado, ripetiĝanta ĉiun duan jaron (sen vokaloj); Pli-malpli regula cirkli'.
11. (inverse) Nedifina adjektivo signifanta «de tute ne difinita speco, kun tute nedifinitaj ecoj»; Prepozicio esprimanta tion, al kio estas destinita aŭ adaptita io aŭ iu; Suf., prezentanta la plenumanton de procezo post ties plenumiĝo (t.n. «de aktiva preterita participlo»).
12. Teksaĵo el linaj, kanabaj, jutaj, kotonaj fadenoj, interkrucitaj laŭ aparta sistemo; Ago de tiu, kiu uzas ion kiel pravigon aŭ motivigon por plua agado aŭ teoriado.

(la solvo troviĝas en la lasta paĝo)

* Pardonu mian fuŝadon en ĉi tiu krucvortenigmo, pro manko de tempo mi devis enkondukis kelkajn strangajn vort-ludojn en la demandoj.

Nova interreta E-kurso, vive, regule, kun instruistino



Ankaŭ ĉi-jare la Jagelona Universitato en Kraków, Pollando, deziras kontribui al plialtigado de la lingvokono de esperantistoj el ĉiuj landoj. Ĝi invitas al 5-monata kurso de Esperanto, gvidota de instruistino vive, en Interreto. La kurso komenciĝos en novembro 2017. Ĉiu nia kurso estas nova,

freŝa, kun aliaj materialoj kaj variaj scioj; ĝi estas malkovriga por esperantistoj. Ĝi koncentriĝas al la bezonoj de ĉiu partoprenanto kaj helpas disvolvi rivelitajn talentojn. Instruas Maria Majerczak.

La oficialaj konfirmiloj pri la partopreno enhavas krom la konfirmo kaj blazono de la universitato, la markon de la internacia EAQUALS-kvalito de Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato, kio plialtigas ilian internacian prestiĝon.

Limdato por aliĝi: 10 oktobro 2017 (aŭ poste, laŭ disponeblaj lokoj). Informoj: <https://goo.gl/x1S3AH>

Se, studinte ĉiujn informojn en la indikita retpaĝo (la anonco), vi decidis ALIĜI, bv. skribi al:

[esperanto.instruado.jag.univ.pl\(ĉe\)gmail\(punkto\)com](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(ĉe)gmail(punkto)com)

Kore salutas vin

Maria Majerczak

Universitata instruistino

Oferto de kontrakto doktoriĝa pri Esperanto en la universitato de Liverpool



La universitato de Liverpool ofertas kontrakton doktoriĝan (£ 14.553 jare dum 4 jaroj) por tezo pri

Esperanto (lingvistiko, literaturo, historio).

Kandidatiĝoj de historiistoj aparte bonvenos.

Respondoj sendendas ĝis la 11a de decembro 2017.

Informoj en la angla aŭ en Esperanto ĉe D-ino Angela Tellier

atellier@liverpool.ac.uk

Informoj en la angla en la alkroĉitaĵo aŭ en tiu ĉi retejo

<http://www.esperantoresearch.org.uk/site/stipendiary-buchanan-graduate-teaching-fellowship>

Mi estas tute laika sed havas intereson pri religio. Mi pensas, ke origine religio traktas homan morton kun limhava vivo, alivorte “kiel travivi feliĉe”. Sekve ĝi ankaŭ havas la rolon kiel forpreni de homoj ĉagrenon de privata vivo kaj timon al morto. Sen naskiĝo ne povas okazi ĉagreno kaj morto. Naskiĝo estas senkonscia kaj pasiva okazo al naskito, tamen morto estas iasence konscia kaj neevitebla al homoj. Naskito, kiu estis donita de Dio la vivon kun animo, devus zorgi sian vivon karan kun dankemo al Dio kaj laŭeble utiligi ĝin kun amo por aliaj. Mi pensas, ke ĉiu religio kun tradicio kaj universaleco krom suspektindaj religioj instruas, ke tio estas grava por vivi feliĉe. Do, de naskiĝo ĝis morto, naskotago, nupto kaj funebraĵo rilatas al homoj kiel gravaj ceremonioj de ĉiu religio en la mondo. Precipe, temante pri “kiel morti” egale al “kiel vivi” ni bezonas la saĝon kaj la helpon de religio; nome por firmigi la privatan penson pri vivo kaj morto. Ŝajnas al mi, ke ĉiu religio en la mondo havas ne nur propran kulturon kaj laŭaspekte distingeblan riton sed samtempe komunan tezon inter si kiel travivi feliĉe kaj mildigi la timon al morto. Temas pri tio, la internacia dialogo inter religioj estas tre grava por monda paco, precipe pri komuna tezo. Nun, en la urbo Kioto, Japanio, okazas Internacia Religia Konferenco por konstrui mondan pacon per religia forto. Kaj ĝi festas la 30an datrevenon kun reprezentantoj el diversaj religioj en la mondo. Estas diversaj temoj en la simpozio kiel “Terorismo kaj religio”, “Internacia kompreniĝo inter religioj, ka. kiuj tre karakterizas ĉiun kulturon”. Hodiaŭ mi provas skribi pri japana religio.

De antikva tempo japanoj kredas, ke ĉiuj ekzistaĵoj, ne nur vivaĵoj sed senvivaĵoj kiel roko, akvofalo, ktp en naturo, havas animon kaj ili estas gefiloj de ĉiopova Dio. Ili estas esprimataj per “dio” en minusklo kontraŭ “Dio” en majusklo. Ili ĉiuj estas necesaj ekzistaĵoj por kunvivi en la mondo kaj havas propran rolon aŭ animon laŭ Dia volo. Do, homo ankaŭ estas unu el ili. Tion oni nomas “animismo”. Mi pensas, ke tia ideo helpus konservi nian terglobon por teni pli bonan ekologian sistemon kaj medion al estonteco. Ĉirkaŭ en la 6-a jarcento budhismo venis en Japanion el Eŭrazia Kontinento tra Ĉinio kaj Koreio kaj kvankam okazis etaj konfliktoj inter dio de animismo kaj Budho (Dio) de budhismo, japanoj akceptis budhismon kun dogmo pli universalan ol animismo sen dogmo per la formo de “kuniĝo”. Temante pri dio kaj Dio, japana dio kiel animismo kovas amon al naturo, dum Dio kiel budhismo malpermesas al homoj detruon de naturo kiel la pekon kontraŭ sia leĝo pri mortigo. Do, ambaŭ

havis bazan komunecon por “kuniĝo”. Plie, survoje al Japanio por sia misio tra diversaj landoj, mahajana budhismo renkontis diversecon (zoroastrismo, kristanismo kaj diversaj primitivaj religioj), pro kies spertoj ĝi eble ekhavis grandan animon al kuniĝo kun aliaj. Tial “Mahajano” ankaŭ alinomiĝas Granda Vehiklo (Granda Buso), kiu signifas la buson kapablan veturigi al sukavato (paradizo) kune kun multe da diversaj homoj. Ŝajnas, ke tia grandanimeco aŭ toleremo de la budhismo kiel Mahajano allogis japanojn al budhismo, kiuj akceptis ĝin aŭ kuniĝis kun ĝi. Aliflanke, antaŭ ol budhismo envenis en Japanion, ne nur ĉiu vilaĝo, urbeto kaj gubernio sed eĉ Mikado (japana imperiestro) en Japanio apoteozis sian propran dion kiel tiun de arbo, roko, monto, ktp de animismo. Kaj tamen, malgraŭ tia stato Mikado longe kovadis ĉagrenon kiel lerte regi la tutan landon per pli universala religio, pro kio budhismo estis bonvena al tiama Mikado kaj preskaŭ senbatale akceptita de Japanio en la formo de “kuniĝo”. Nun en Japanio, najbare de ĉiu budhisma templo staras ŝintoisma sanktejo devena el animismo, kio montras la kuniĝon de ambaŭ kredoj per videbla formo. Do, tio estis plenumita en malfermita sistemo ne per ekskluziveco sed per la konkuro kaj la kuniĝo inter budhismo kaj animismo, dum la kuniĝo inter kristanismo kaj primitivaj religioj kiel tiuj de kelto kaj ĝermano estis plenumita en fermita sistemo, ke kristanismo malpermesis reciti eĉ nomon de ilia primitiva dio, mutigis ilian miton kaj kirkoj estis konstruitaj sur la sanktejoj de kelto kaj ĝermano.

Nuntempe japanoj nomas la kuniĝon “harmonio” (japane, “**ŝuugoo**” = 習合 aŭ “**ŭa**” = 和), kiu donis tre gravan pensmanieron al japanoj. Japanio konsistas el insuloj, kie loĝas preskaŭ unu raso parolanta nur unu lingvon kaj ne okazis invado de aliaj landoj krom la kelkaj el Mongolio, kiuj tamen fiaskis pro la atako per militŝipoj dum tajfuna (ciklona) sezono. Ĉu pro tiu geografia cirkonstanco, japanoj ne ŝatas pretendi al aliaj kaj esprimi karakterize sian opinion por esti paca kaj harmonia kunvivado en Japanio ĉirkaŭita nur de maro, kie ili povas vivi en mildaj kvar sezonoj kun bongustaj manĝaĵoj el kampoj, montoj kaj maro. Tial, eĉ kontraŭ malfacila problemo solvenda oni emas silente diveni aliajn opiniojn bona aŭ malbona por teni harmonion en tia fermita komunumo. Do, alilandanoj ofte demandas, ĉu en Japanio floras vera demokratio aŭ ne, kaj aldonas, ke japanoj ŝajnas timidaj kaj mallertaj pravigi sian



pretendon en internacia konferenco kaj similaj. Nuntempe, ĉu pro la influo de la kuniĝo inter budhismo kaj animismo, preskaŭ ĉiuj japanoj ne hezitas ĝui jarfine kun familianoj Kristnaskon, viziti en novjaro kune kun familianoj sanktejon (ŝintoisman templon) de animismo por peti de dio surteran profiton kiel bonsanon, riĉon kaj sukceson por si mem kaj siaj familianoj, kaj adori somere en ulambano sian prapatron antaŭ la tombejo en budhisma templo. Alilandanoj surpriziĝas de tiaj bildoj, opiniante, “En mia lando neniam okazas tiaj agoj sen principo.” Animismo, kiu akceptas ĉiujn ekzistaĵojn egalaj kaj alte taksas ĉiun propran rolon por kunvivi laŭ Dia volo, havus toleremon pri diverseco.



Mi iomete tuŝas pri japana budhismo kaj la ekzisto de animo.

Montoj kaj arbaroj en Japanio okupas pli ol ĉirkaŭ 70% de la tuta lando kaj ĝi estas pluvoza lando. La lando estas dividita de markoloj kaj montaroj el vulkano. Inter vilaĝoj kuŝas montoj, riveroj kaj malsekaj terenoj, kaj tie ebenaĵoj estas naztuke malgrandaj sed abundas je riĉe diversaj ekologiaj sistemoj, ĉirkaŭite de kompleksaj pejzaĝoj. Pro tiel riĉa je naturo nepre floris animismo en Japanio. Tamen en tia Japanio ofte okazas katastrofoj kiel tertremo, cunamo (altega marondiĝo), erupcio de vulkano, inundo de pluvego, tajfuno (ciklono), ktp. Pro ofte okazantaj katastrofoj kaj bakterioj loĝantaj en la malseka tereno, japanoj pensis, ke nenio estas senŝanĝa kaj senputra. Ili sentas en tio nekonstantecon aŭ vantecon same kiel oldiĝon al morto de ĉiuj vivaĵoj inkluzive homojn kaj forputron de ĉiuj senvivaĵoj. En Japanio la elemento postulata al ĉiuj artistoj kiel ceramikartisto, pentristo, kaligrafo, skulptisto, poeto, ĝardenisto, muzikisto, k.a. konsistas en la aprezo kiel artisme esprimi nekonstantecon kaj vantecon en ĉiu artaĵo. Japanoj trovas en tio la belecon de kadukiĝo. Estas fame konata arbo en Japanio, nomata “Sakuro”, belflora arbo en printempo, kiu ekfloras tuj plene kaj post semajno disfalas preskaŭ samtempe petalojn post petaloj, kiuj faras

tapiŝon surtere kvazaŭ iluzian en paradizo. En tiu momenta florado kaj samtempa disfalo japanoj sentas la belecon de vanteco, kies bildon ili nomas japane “Ŭabio” (trista) kaj “Sabio” (soleca). En Japanio abundas je diversaj vivaĵoj kaj senvivaĵoj, kiuj tamen iam kadukiĝos, mortos aŭ forputros. Do, multaj japanoj pensas, ke en la mondo nenio estas eterna, infinita kaj absoluta. Kaj japana budhismo kondamnas, “Kiu persistas en siaj posedaĵoj, tiu falos en malfeliĉon”. La tri kondiĉoj de monoteismo kiel judismo, Islamo kaj kristanismo naskitaj sur dezerto kun nenio estas “eterno” neŝanĝanta por ĉiam, “infinito” kun senlima vasteco, kaj “absoluto” senkulpa por eterne, kio esprimus Dian amon al ĉio, egalan al “leĝo de la naturo”, kiu donadas malavare kaj egale al ni vivantoj la plej necesajn aeron, akvon kaj lumon por nepre vivi sed neniam postulas ties ekvivalenton al la donitoj. Nenio sur dezerto, al kio oni ne povas havi postulon, estus absoluta kaj senerara ekzisto, dum Japanio estas plena de diversaj aĵoj, kiuj havas kadukontajn fatalojn, naskis nekonstantecon kaj ne povis havi la koncepton pri “absoluto”. Eŭropa civilizacio sur monoteismo naskita sur arida dezerto eltrovis principon kaj regulon kun ideo, dum Japanoj kun katastrofoj formis la socion laŭplaĉan, neformaligitan de regulo, kaj sen principo. Sed, temas pri ambaŭ, ne povas esti demando, kiu estas supera aŭ malsupera. Prefere natura kondiĉo certe donadas al ties loĝantoj la influon pri iliaj vivmaniero, pensmaniero, moro kaj eĉ doktrino de ĉiu religio, mi pensas.

En Japanio estas metempsikozo (la postmorta transmigrado de la animo el iu korpo en alian). Ĉiu religio en Japanio uzas ĝin por admoni civilulojn: “Agu bonfare kaj post morto vi naskiĝos en paradizo aŭ renaskiĝos kiel homo. Se ne, vi naskiĝos kiel aliaj bestoj aŭ vivaĵoj.” Ĉirkaŭ en la jaro 1000, la epoko Heian en Japanio, aperis la libro pri postmorta mondo, eldonita de fama bonzo nomata Genŝin, “Kien ni iros post morto, ĉu al paradizo aŭ infero kun klasoj?” Ĝi priskribas la senripozan mondon kun la klasifikitaj ses mondoj post morto; paradizo, la mondoj de homo, Aŝuro, besto kaj malsatega narako kaj vera infero, kie ĉiu renaskito devas penadi per pli bona agado kaj transmigradi de malbona klaso al pli altklasa paradizo. Se al la renaskito eĉ en paradizo mankas la ekzercado de bona agado, li falos denove en la mondon pli malsuperan al infero. Tiun metempsikozon la bonzo Genŝin montris al civiluloj per bildoj. Eĉ analfabetoj povis kompreni la enhavon per la bildoj, pro kio li sukcesis ekkredigi multajn homojn al sia religia sekto. Islamo kaj kristanismo havas la ideon nur pri paradizo kaj infero post morto kaj ili ne havas la ideon de metempsikozo kiel

budhismo. Tamen tie kuŝas la problemo, ĉu vere ekzistas tiel nomata animo en la mondo por transmigrado. La plej interesa demando al ni homoj estas, kie ni estis antaŭ naskiĝo kaj kien ni iros post morto. Se ekzistas animo kun konscio, ni povas trovi, kie ni estis antaŭ naskiĝo. Sed homoj ne povas percepti tion. Ŝakjamunio demandita de sia disĉiplo, “Kie estas paradizo post morto?”, respondis, “Mi ne scias ĝin, ĉar mi ankoraŭ ne vizitis tien. Neniam diru pri tio.” Tial tuŝi animon estas malpermesite oficiale en budhismo.

Religia muziko en Japanio regas ian malĝojecon aŭ langvoron, ĉu pro la influo de la nekonstanteco kaj la vanteco el japana naturo aŭ pro japana kredo, ke la animo post morto iras en monton aŭ arbaron, kie regas mallumo kaj malsekeco. Religia muziko en Hindio naskinta budhismon estas gaja kaj vigla, eble pro tio, ke naskiĝo, oldiĝo, malsaniĝo kaj mortiĝo estus komprenitaj aferoj kiel natura fenomeno en seka lando kaj paradizo estas okcidente luma, kien la suno sinkas ĉiutage. Do, eĉ en la populara kanzono japana regas la melodio kun malĝojeco, mallumeco kaj malsekeco.

Jam delonge en Japanio estas du skoloj de budhismo. Unu el ili emfazas, kiel homoj devas vivi, kaj la alia, kiel homoj devas morti. La bonzo Kuukai, la fondinto de la mantrista sekto eltrovis la signifon; kiel vivi, dum la bonzo Genŝin de honenaismo; kiel morti. Kuukai predikas, “Ĉiu homo naskiĝis kiel unu el la necesaj ekzistaĵoj, kiuj havas ĉiun propran rolon donitan de Dio, sed bedaŭrinde multaj ne povas trovi sian rolon ĝis la morto. Se ili povas trovi sian rolon por aliaj, ili tuj fariĝas dioj naskitaj sur paradizo kun senmorte eterna vivado. Oni povas ek trovi la rolon per kontaktoj kun diverseco”. La prediko estus parte influita de animismo. Genŝin predikas, “Ĉiuj homoj jam estas permesitaj iri al paradizo post morto kaj eĉ reveni al surtera mondo. Kredu min”. Estas ial kompreneble pri “iri al paradizo post morto” sed

dubinde pri “reveni de paradizo al surtera mondo” senpere de tiel nomata animo. Sed la prediko al civiluloj preskaŭ analfabetaj en tiu tempo havis persvadon uzante la vorton “animo”, per kiu oni povas iri kaj reveni kiel provizora rimedo. Sed ĉar oficiale uzi la vorton “animo” ne estas permesite, estas skribite en la dogmo tiel, ke post ekkredo al la sekto oni jam ekvivas en paradizo kaj de post tiam oni povas ĝui la paradizon en surtera vivo.

Estas la mondaj kulturaj heredaĵoj de Unesko en la mondo rilate al religioj. Inter ili estas la heredaĵoj kiel primitiva preĝo antaŭ apero de religio, kuniĝanta formo de religioj kaj fame konataj religioj. La celo de Unesko per la monda heredaĵo estas krei la kulturon de paco. La renkonto inter kulturoj estas origino por krei novan kulturon kaj fonto por evoluo de homaro. Dum transnacia kontaktado oni rekonas sian kulturon kaj komprenas la aliajn. En tio oni povas ek trovi reciproke bezonatan ekziston. Tiu ek trovo povos ligiĝi al versaĝo, sendiskriminacia saĝo, kiu estas la forto krei pacan kunvivadon en la mondo. Do, kio estas “la kulturo de paco”? Ĝi estas la kulturo estimi diversecon kaj egalecon de kulturoj, realigi la socion, kiu klopodas konservi bonordan sistemon de ekologio kaj realigi senperfortan mondon. Eĉ nun en la mondo ripetiĝas konfliktoj pro diferenco inter si pro kulturo, religio, lingvo, nacieco, k.a. Tio devenus de analfabeto sen eduko pro malriĉeco kaj de neglata dialogo pro lingva baro trans landlimoj. Unesko prezentas al ni la gravecon de diverseco per mondaj heredaĵoj kiel la neanstataŭigeblaj.

Esperanto egala por ĉiuj nacioj, kiu estas la helplingvo respekti diversajn lingvojn kun kulturoj, kaj per kiu homoj klopodas ĉiam alproksimiĝi al neŭtrala komuna loko por kompreni unu la alian, kies sinteno vartos la kreadon de “kulturo de paco”.

(Aŭgusto 2017)

el paĝo 6 >>>> Jam dum pli ol 15 jaroj, La Tekstaro helpis al sennombraj esploristoj – Esperantistaj aŭ ne – pristudi ĉiajn aspektojn de skribita Esperanto. Uzantoj povas enketi pri la leksiko, de unuopaj morfemoj ĝis plurvortaj esprimoj kaj parolturnoj, kaj esplori simile detale pri la gramatiko. Eblas eltrovi diversajn trajtojn de la enhavo kaj stilo de tre diversaj verkoj, ricevi konsilojn pri bona uzo, distingi la Zamenhofajn kaj nezamenhofajn uzojn de vortoj, kaj kontroli la evoluadon de Esperanto trans pli ol 120 jaroj.

Dum la unua fazo koncentriĝis je kolektado, unuecigado kaj prilaboro de tekstoj ekzistantaj en

elektronika formo, kaj la dua pri la kompletigo de la tekstoj (interalie, el diversaj Esperantaj periodaĵoj) kaj kreo de uzant-amika interfaceto, tiu ĉi, la tria fazo, signife riĉigis la korpuson: multaj skanitaj tekstoj alireblaj ĉe la Aŭstra Nacia Biblioteko estis aldonitaj, tiel ke la tekstomaso nun ampleksas pli ol 4,8 milionojn da vortoj. Inter la plibonigoj estas la kapablo fari samtempajn serĉojn, la kapablo kunigi la serĉojn, elekti/limigi la serĉotajn periodojn, kaj, kompreneble, la kapablo funkcii per diversaj retumiloj kaj aparatoj. En la unuaj du fazoj Bertilo serĉis konsilojn de famaj esperantaj specialistoj: Ilona Koutny, Jouko Lindstedt, Carlo Minnaja, Chris Gledhill kaj Mauro La Torre.

>>>>>
iru al
paĝo 24



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun filozofo Immanuel Kant

Vasil Kadifeli

Immanuel Kant (1724-1804) - parto 2

Oni frapas sur vian pardonon, iu vundita homo, kiu petas helpon, kaj vi faras ĉion ajn por helpi kaj flegi lin. Sed laŭ Immanuel Kant, se vi tion faras



pro via sento de bedaŭro por li, tiu ago de vi tute ne estus morala. Bedaŭro ne havas rilaton al moralo. Tiu povas esti via trajto sed ĝi tute ne rilatas al ĝustaĵo aŭ malĝustaĵo. Moralo rilatas ne nur al tion, kion vi faras, sed al kial vi tion faras. Decido devas esti bazita sur menso kaj ne

sur sentoj. Sentoj ne devas enmiksiĝi en decidoj. Homoj havas diversajn sentojn kaj trajtojn, sed esti bona kaj ĝusta devas esti bazita sur menso. Se vi helpis la vunditon ĉar vi pensas ke tiu estis via devo, tiam via ago estas morala, ĝusta kaj bona.

Tio estis io, kion ankaŭ Aristotelo pensis (vidu Turka Stelo #004), sed Kant estis certa pri tio. Se vi faras ion nur pro viaj sentoj, tio neniel povas esti bona ago. Eĉ se vi sentis naŭzon kaj ne bedaŭron kontraŭ la vundita homo, sed vi tamen lin helpis, tiam vi agis morale.

Pensu pri la rakonto de la Bona Samariano ¹. Se li helpis la homon, kiu kuŝis sur la strato vundite, por ke li povu eniri paradizon, tiam li ne agis morale ĉar li uzis la helpon al la vundita homo, kiel ilo por malfermi la pordojn de paradizo. Sed, se la Samariano helpis la homon ĉar li pensis ke tiu estis sia devo, kaj la devo de iu ajn, tiam la Samariano estis homo kun bona moralo.

Ni ĉefe taksas homojn ne pro kio ili faris sed pro kio ili klopodas fari. Ni pensu ke iu alia homo frapas sur via pordo, iu amiko de vi, kiun postkuras murdinto kun tranĉilo enmane. Vi prenas ene vian amikon kaj vi kaŝas lin. Denove, iu alia homo frapas sur via pardonon kaj kiam vi malfermas ĝin vi renkontas la murdinton kun la tranĉilo, vi mensogas al li, ŝajne ke via amiko forkuris al la apuda parko, do vi misgvidas la murdinton por savi vian amikon. Ĉu tiu estas morala ago? Laŭ Kant tute ne, ĉar li pensis, ke neniu kaj

neniel devas mensogi. Ĉar se dume vi amiko pro timo saltis el la fenestro kaj iris kaŝi sin en la parko, kaj la murdinto kiun vi sendis al la parko trovas murdas vian amikon, tiam vi respondecus pri la murdo de via amiko.

Tiu penso de Kant ŝajnas esti troigo. Laŭ Kant diri la veron estas devo. “Kondiĉaj ordonoj” havas la formon: “Se vi ne volas malliberiĝi, ne ŝtelu!”. Kontraŭe, “senkondiĉaj ordonoj” havas la formon: “Ne ŝtelu!”. Laŭ Kant, esti morala estas homa devo. Kiu ajn estas ĝiaj kondiĉoj kaj konsekvencoj, via morala devo estas esti morala. Homoj ne nur agas kun instinktoj sed ankaŭ kun siaj cerboj. Niaj agoj baziĝas sur “maksimoj” ², kaj maksimumo estas la respondo al la demando “kial vi faris tion?” Laŭ Kant maksimumoj estas universalaj kaj agoj devas baziĝi sur ili. Por ke maksimumoj estu universalaj ili devas esti validaj por ĉiuj. Ne nur por tiuj, kiuj trovas sin en la sama situacio kun vi. Vi ĉiam devas demandi: “kio pri, se ĉiuj kondukus same?”

Kant diras ke oni ne devas manipuli aliulojn, ni, kadre de respekto al homoj, devas konduki kontraŭ ili, taksante iliajn aŭtonomecon kaj iliajn kapablojn preni raciajn decidojn por si mem. Tiu respekto al homa honoro kaj al individua valoro estas la esenco de la moderna teorio pri homaj rajtoj. Tiu estas la plej grava kontribuo de Kant al morala filozofio.

Eble ni bezonas ekzemplon por tio: Se vi estas frukto vendisto kaj ĉiam donas la restojn de mono ĝuste kaj komplete al viaj klientoj, kaj vi faras tion por ke vi ne perdu viajn klientojn, tiam tiu ago ne estas morala. Sed, se vi agas tiel ĉar vi pensas, ke “ne trompi homojn estas via devo”, tiam via ago estas morala. “Ne trompi aliulojn” estas maksimumo universala, kiu povas esti aplikata al iu ajn situacio.

Tiu estas iomete malsimila ol la pensoj de Aristotelo. Aristotelo diris, ke homo kun ĝustaj sentoj agas ĝuste. Sed Kant diris, ke sentoj malhelpas nin kompreni ĉu tiu homo agas ĝuste aŭ ne. En resumo Kant faris moralon atingebla al ĉiuj homoj kun racio. Kant diris, ke senrigarde al iliaj konsekvencoj, kelkaj agoj povas esti malĝustaj. Bentham, nia posta filozofo, diris la malon: la konsekvencoj kaj nur la konsekvencoj estas tio, kio gravas. Sed tion ni diskutos en nia novembra numero.

(daŭrigota)

¹ La bona Samariano : estas rakonto de Jesuo en unu el la evangelioj de la Nova Testamento

² Maksimo: Principo de konduto, veraĵo pri la vivo, esprimita koncize.

Homaro ne povas vivi kun nukleo

Tiu ĉi somero estas la unua, memorinda somero post kiam la pakto pri abolo de nukleaj armiloj estis adoptita de 122 landoj la 7an de julio 2017 en la Unuiĝintaj Nacioj. La oficiala nomo de tiu ĉi pakto estas "Pakto pri malpermeso de ekspluatado, testado, produktado, stokado, transdono, uzo kaj minaco per uzo de nukleaj armiloj kaj ĝia abolo" (angle:



Convention on the Prohibition of the Development, Testing, Production, Stockpiling, Transfer, Use and Threat of Use of Nuclear Weapons and on their Elimination). Kiam 50 landoj subskribos ĝin, ĝi ekvalidos post 90 tagoj.

Supra mapo montras, kiuj landoj aprobis la pakton.

Bedaurinde Japanio ne aprobis ĝin kune kun landoj posedantaj nukleajn armilojn kaj kun landoj sub la usona nuklea ombrelo.

Ĉiun jaron la 6an de aŭgusto en Hiroŝima kaj la



9an Nagasaki okazas Ceremonio por Paco. En la ceremonio en Nagasaki la urbestro Taue Tomihisa parolis jene pri la grava signifo de tiu ĉi pakto:

"Ne plu hibakuŝa-oj (atombombitoj)!" Tiu ĉi vorto kiel ilia elkora deziro esprimas, ke neniu plu spertu mizerajn pro nukleaj armiloj. Tiu deziro movas multajn landojn en

la mondo kaj naskis tiun pakton.

Pakto pri abolo de nukleaj armiloj estis adoptita de 122 landoj, pli ol 60% de la membraj landoj de la Unuiĝintaj Nacioj. Tio estas frukto de multjara klopodo de hibakuŝa-oj. Mi volus nomi tiun pakton "Pakto de Hiroŝima kaj Nagasak". Kaj mi dankas al la landoj, UN kaj NGO-oj, kiuj kuraĝe subtenas la pakton kun forta volo elimini malhumanaĵojn.

Sed tiu ĉi ne estas la fino de nia movado. Nun ekzistas 15000 nukleaj armiloj en la mondo. Internacia politika situacio pri nukleaj armiloj pli kaj pli fariĝas

minaca kaj nun etendiĝas timo, ke en nemalproksima estonteco nukleaj armiloj estos uzataj. Krome la landoj, kiuj posedas nukleajn armilojn, kontraŭas la pakton, tial nia vojo al sennuklea mondo estas nebula. Kiel vivi la ĵus naskitan pakton estas grave por la homaro.



Kaj poste la urbestro forte kritikis la japanan registaron:

Ni volas diri al la japana registaro. Ĝi eĉ ne ĉeestis la kunvenon pri la pakto, kvankam ĝi pledas pri tio, ke ĝi ludos la ĉefan rolon kiel peranto inter la landoj kun nukleaj armiloj kaj la landoj sen tiuj, celante krei sennuklean mondon. Ni, la atombombitaj urboj, tute ne povas kompreni ĝian sintenon. La japana registaro, kiel tiu de unu sola atombombita lando, plej rapide aprobu la pakton, ŝanĝante sian politikon kaj sendependante de la usona nuklea ombrelo. Tion la internacia komunumo atendas.

Japanio disvastigu al la mondo pacan ideon de la Japana Konstitucio, kiu deklaris, ke Japanio ne plu militu, kaj la tri principojn* pri nukleaj armiloj, kaj nun ekstudu eblecon fondi "Sennuklean zonan en la



nordorienta Azio" kiel unu el la konkretaj rimedoj por sennuklea mondo.

En la sama ceremonio kiel la reprezentanto de hibakuŝa-oj, s-ro Fukahori Joŝitosi parolis jene:

Kiam la atombombo estis faligita sur la urbon Nagasaki la 9an de aŭgusto 1945, mi estis 16-jara. Tiam mi estis mobilizita al iu oficejo 3,6 kilometrojn for de la epicentro. Je la 11a horo kaj 2 minutojn fulmis blanka ekbrilo kaj aŭdiĝis eksploda bruo, kaj mi tuj kaŝis min sub la tablon.

Vespere estis permesite al ni reveni hejmen kaj mi atingis la piedon de la monto Konpira kaj renkontis subvenantajn homojn el la urbo Nagasaki. Ili rekomendis, ke mi ne iru plu, ĉar la tuta urbo estas en fajro. Mi rezignis plu iri, kaj en la venonta mateno mi celis la stacidomon Nagasaki, paŝante laŭ fervojaj

reloj. La stacidomo kaj mia kara urbo tute malaperis kvazaŭ mi estus en alia mondo. Mi atingis mian domon, sed ĝi estis detruita. En ĝi mia pliaĝa fratino mortis, kvazaŭ brakumi la trabon per la dekstra brako. Se mi revenintus al la hejmo en la antaŭa tago, mi povintus helpi ŝin. Tion mi eĉ nun tre bedaŭras.

Tiu atombombo momente pereigis 74000 homojn kaj vundis 75000 homojn. Tiuj, kiuj apenaŭ fuĝis de la bombita loko, suferis pro nekonataj malsanoj kaj baldaŭ mortis.

Mi kredas, ke homaro ne povas vivi kun nukleo. En marto 2011 okazis la nuklea akcidento en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, kaj rezulte ĉiuj nukleaj reaktoroj estis haltigitaj. Ni ĉiuj estis teruritaj de nukleaĵoj, sed eĉ en tiu situacio la registaro funkciigis pli kaj pli da nukleaj reaktoroj. En tertrema lando Japanio ĉiaj precizaj kaj striktaj reguloj pri nukleaj centraloj estas senfortaj kontraŭ tertremegoj. Mi opinias, ke Japanio pli dependu de natura energio.

Post la dua mondmilito Japanio evoluis dank' al la paca konstitucio, kaj tiamaniere Japanio estas fidita kaj altetaksata de landoj en Azio kaj de la mondo. Ni ne perdu tiun heredaĵon. Ni ne forgesu nian devon kiel unu sola atmbombita lando.

En 1979 ni, 6 pluvivintoj en Nagasaki, komencis kolekti fotojn pri nia atombombita urbo, kaj ni kolektis kaj esploris 4000 fotojn. Ni kredas la forton de tiuj fotoj, kiuj prezentas realon de la atombombita urbo al la mondo, kaj per tiuj fotoj ni laboros por la paca mondo kaj por abolo de nukleaj armiloj.

Post la ceremonio reprezentantoj de la ses organizoj de atombombitoj renkontis la ĉefministron Abe Ŝinzoo. Reprezentante ilin, s-ro Kaŭano Kooiči el la Centro de Paca Movado diris al la ĉefministro:

"Ni estas tre ĝoja, ke la pakto pri abolo de nukleaj armiloj estis adoptita. S-ro Abe, en kiu lando vi oficas kiel la ĉefministro? Ĉu vi forĵetos nin? Aŭ ĉu ni forĵetos vin? Nun estas la tempo, kiam nia lando ĉefrolu por aboli nukleajn armilojn".

La ĉefministro Abe respondis, ne tuŝante la pakton: "Por fari vere sennuklean mondon, estas grave, ke landoj kun nukleaj armiloj kaj landoj sen tiuj kune



partoprenu."

Post la renkontiĝo s-ro Kaŭano diris, "Mi demandis lin, en kiu lando vi oficas, sed li nenion respondis. Li eĉ ne tuŝis la pakton. Tio estas nekredbla".

La ĉefministro Abe insistas, ke li peros ambaŭ flankon, sed tio tute ne estas ebla por li. La 6an de aŭgusto en la maro de Aŭstralio aviadilo nomata Osprey falis kaj 3 soldatoj mortis. Tiu Osprey apartenas al la usona bazo en Okinavo, kaj la japana registaro petis haltigon de ekzercado de Osprey-oj en Japanio ĝis klariĝos kaŭzoj de la akcidento, sed Usono ignoris tiun peton kaj la 8an ĝi komencis ekzercadon en Okinavo, kaj tuj poste la registaro aprobis tion, pretekstante, ke Usono garantiis la sekurecon. Tiamaniere en tiaj okazoj Japanio nur petas, kaj tuj poste senkritike aprobas usonan agon surbaze de informoj donitaj de Usono. Japanio nemiam kritikis Usonon aŭ rekomendas ion al Usono. Ni tute ne kredas, ke tia registaro povos persvadi Usonon por abolo de nukleaj armiloj. Sub tiu ĉefministro Japanio estos eterne subulo kaj servisto de Usono.

Kiam hibakuŝa-oj komencis agadi por leĝigi la pakton, ŝajnis al ĉiuj, ke tio tute ne estas realigebla, sed post 72 jaroj ilia revo realiĝis. Kompare kun tiu strebado, forĵeti la ĉefministron Abe estas tre facila. Post ne longe ni havos tiun tagon.

* Japanio ne posedu, ne produktu, ne enkonduku nukleajn armilojn.

Kiam oni lernas novan lingvon

Ĉiu havas sian propran motivadon lerni novan lingvon. La impresoj kaj la spertoj de lernado estas eble diversaj. Estas personoj, kiuj lernas alian lingvon ĉar ili volas iri eksterlande por studi, por labori, aŭ simple ĉar la lingvo tre plaĉas al ili. Alia persono eble sentas, ke estas tre interese paroli lingvojn aparte de sia loka aŭ nacia lingvo. Kaj kun la nova scio, li povos komuniki kaj interŝanĝi informon kun aliaj personoj internacie, precipe en la

Yohanes Manhitu, el Indonezio

nuna epoko, kiam oni havas multajn komunikajn faciligojn, ekzemple la interreton.

Persone, mi tre ŝatas lerni lingvojn. Kaj mi estas certa, ke kiam oni lernas novan lingvon, oni malfermas novan pordon al nova popolo kun aparta kulturo kaj vidpunktoj. Konante la lingvon, oni povos malrapide



konstrui reciprokan komprenon dum oni gardas bonan komunikajon. Sajnas tre ideale, sed ne estas sendefie provi tion. Laŭ mi, ĝi ne estas eble koni multamplekse popolon sen bona scio de ĝia lingvo, ĝia propra kultura identeco. Ekzemple, ĝi estas nekonvinke kompreni la davanan (dawan) popolon de Okcidenta Timoro sen la scio de davana --- la lingvo plej parolata de la okcidenta parto de la "insulo de sandalo".

La lernado de nova lingvo, precipe de unu tre forta, ne estas senriska. Kiam la nivelo de scio kreskas kaj la situacio permesas, oni volas uzi la lernatan lingvon. Unuflanke, ĝi estas helpema por plibonigi la lingvon jam lernita dum multe da tempo. Se la laboro postulas, oni devas akcepti por plenumi tion, kiun oni devas gajni. Aliflanke, la uzo de unu tre forta lingvo kun tro granda fiereco eble malfortigos la fierecon de sia propra lingvo, kaj indiĝena kaj nacia.

lo, kion oni devas eviti en la lernado de nova lingvo estus lingva distingado. Tio signifas, ke por gardi ĉiu lingvo lernita oni devas trakti ĝin laŭ ĝia rolo en la ĉiutaga vivo. Ĝis nun, mi konsideras kaj la davanan kaj la tetuman kiel lingvoj donantaj al mi timoran identecon. La indonezia estas mia nacia lingvo, per kiu mi komunikas kun samlandanoj. La angla, kiun estas konsiderata kiel la nuna internacia lingvo, helpas min gardi kontaktojn kun personoj en aliaj landoj. Krome, mi uzas ankaŭ aliajn lingvojn, ekzemple la francan, la hispanan, la portugalan, la

italan, kaj Esperanton por la sama kialo. Ĉar mi loĝas en javanparolanta urbo, mi lernas ankaŭ la javanan.

Do, kiam oni lernas novan lingvon, oni jam havas la kialon --- kial oni lernas ĝin. Unu lernita lingvo devas esti utila por la lernanto. La rezulto de la lernado, certe, dependas de la maniero de la lernado mem. Certe ekzistas multaj manieroj, sed mi esperas, ke la jenaj estas utilaj:

- Prononcu laŭtvoĉe kaj korekte ĉiun vorton;
- Lernu multajn vortojn kaj provu scii la bonan uzon;
- Provu kompreni kiel formi frazojn;
- Estu preta por uzi voĉe la lingvon. Ne gravas fari erorojn! Neniu estas perfekta!
- Aŭskultu la radion aŭ kasedojn por kutimi kun la normala rapideco de la parolado kaj por plibonigi vian prononcon;
- Rigardu la televidon kaj filmojn. Ĝi estas helpema por via lernado.

Konklude, mi volas diri ke la lernado de nova lingvo ne estas sen malfacileco. Sed se oni estas persista, oni venkas. Ni memoru, ke "voli estas povi". Ne ekzistas lingvo tro malfacila por lerni subĉiele kiam ni havas la volon. Estas tempo por ĉiuj, kiel oni ĉiam diras.

Fonto: <http://ymanhitsu.blogspot.com.tr/2007/09/kiam-oni-lernas-novan-lingvon.html>

el paĝo
20
>>>>

Tiu tria fazo ne estas la lasta fazo por la evoluo de La Tekstaro de Esperanto. Jam komenciĝis la kvara fazo, kiu celas ampleksigon de la enhavo de la korpuso per gravaj verkoj ne-Zamenhofaj (aparte tiuj el la periodo post la Dua Mondmilito) kaj de tekstoj el diversaj nuntempaj gazetoj kaj periodaĵoj, aldone al tiuj de Monato kaj La Ondo de Esperanto. En la planoj por plia evoluo de Tekstaro estas morfologia markado de la korpuso: t. e., aldone de "signetoj" al la jam ekzistantaj tekstoj, tiel ke en serĉado oni povu eviti la konfuzon inter, ekzemple, la vortoj 'per/son/e' – 'person/e', 'per/fid/e' – 'perfid/e', ktp. La tekstaroj de naciaj lingvoj kutime havas tiajn indikilojn, kaj aldoni ilin al La Tekstaro de Esperanto levos la kapablojn kaj la utilon de Tekstaro al eĉ pli granda nivelo.



ESF

Fonto: La Balta Ondo
<http://sezonoj.ru/2017/09/esf-11/>

La unua IJK en Afriko: Granda sukceso!

Tra la palmoj ĉe la strando en Aneho oni vidas la bluan ĉielon kaj la maron. Ĝi estas tuj apud la lernejo de la sanktuloj Petro kaj Paŭlo, nun plena da homoj en verdaj T-ĉemizoj. Tie ĉi-jare okazis la Internacia Junulara Kongreso de TEJO.

Jam la unuan vesperon okazis spontana koncerto de nova afrika esperantista muzikisto Joel Muhire, kiu preparis por ni kantojn pri Esperanto kaj la temo de la ĉi-jara IJK: "Virinoj kaj viroj kaj siaj kulturoj". Postajn tagojn sekvis koncertoj de Jonny M kaj Kimo.

Kadre de la projekto "Afrika-Eŭropa Junulara Kapablago" okazis trejnadoj, preparitaj de la trejnista teamo pri tiom diversaj kaj gravaj temoj kiel landa agado, gvidado kaj team-konstruado. Aliaj temoj estis praktika trejnado pri uzi ludojn por lerni. La kontraŭdiskriminacia trejnado estis rekte ligita al la temo de la kongreso. La populara trejnado por landa agado ebligis transdonon de scio kaj sperto pri kiel starigi landajn asociojn.

La komisiono pri landa agado de TEJO organizis la kampanjon kaj danke al la malavareco de esperantistoj libroj, revuoj kaj lernolibroj estis disdonitaj al aktivuloj el dek landoj. En la libroservo oni povis aĉeti librojn eldonitajn de afrikaj landaj sekcioj, kiel libroj kun tradiciaj rakontoj kaj vortaroj kaj tiel subteni la lokajn esperantistojn.

Unu de la ekskursoj estis al la lago, kiu donis al Togolando sian nomon. Estis homplena busvojaĝo al Lac Togo (Lago Togo), kiun ni trairis per pirogoj, lokaj lignaj kanuoj, por atingi Togoville. Tie ni vizitis katedralon, kaj en la centro de Togoville ankaŭ gravajn lokojn de vuduismo. Dum alia ekskurso ni vizitis unu lokan reĝon kaj lernis kiel lingvoj kaj kulturoj interrilatas. Ne nur en la ekskursoj tio estis prezentata, sed ankaŭ en la taga programo. Emocia momento estis la vizito de domo, kiu estis uzata por teni sklavigitajn homojn antaŭ forvojaĝo de Afriko. Malpli emocia, sed lernplena sperto, estis la vizito en ĝardeno kie estis arboj de kafo, kakao, gujavo, mango kaj papajo.

Estis kelkaj defioj por la organizantoj – ekzemple la buso por la ekskurso paneis kaj la taga programo devis esti ŝanĝita al alia tago. Ne ĉiu matraco estis komforta la unuan tagon, sed por tio la organizantoj ankaŭ trovis solvon. La ĉiutaga vivo en la kongresejo estis en si mem kultura sperto. Oni lernis, ke duŝi kaj necesejumi ne funkcias sen sitelo: Antaŭ iri necesejumi aŭ duŝi sin, oni devis plenigi sitelon sub la akvokranoj, kunporti la plenan sitelon al la duŝejo/ necesejo; en duŝejoj oni ĉerpis akvon per ujoj por lavi sin, en necesejoj oni rekte verŝis la akvon el la sitelo

en la necesejo. Memkompreneble la partoprenantoj ĝuis ankaŭ la ĉeeston de multaj kuloj, kaj uzis kontraŭkulajn vualojn por pli trankvile dormi. Ĉiam estis homoj pretaj por pruntedoni kontraŭkulŝprucilon kiam iu forgesis ekzemple kunporti al ekskurso. La interreto estis sufiĉe bona por tiuj, kiuj aĉetis lokan SIM-karton.

Kulturaj spertoj estis ne nur en la ekskursoj. Okazis kultur-lingva festivalo (KLF) kun modo-spektaklo plena de tradiciaj vestaĵoj kaj dancoj kaj kun budoj, kie la landoj de la partoprenantoj estis reprezentitaj. Oni prezentis dolĉaĵojn, maldolĉaĵojn (Dankon pro la Marmite, Tim!), alkoholaĵojn. Ĉiuj landbudoj estis interese preparitaj, kaj post la memprezentoj ĉiuj havis eblon gustumi multajn manĝ- kaj trinkindaĵojn. Nacia televido "TVT – Télévision Togolaise" kaj ankaŭ radio "Lumière" faris raporton pri la KLF.

Neniu estas tre surprizita legi, ke pluraj homoj malsaniĝis, tio ja estas la malpli bona flanko de vojaĝado. Dum la kongreso estis pluraj malĝojaj mienoj pro ventrodoloro kaj lakso, malgraŭ tio ĉi la etoso ĝenerale estis tiom bona, ke dum la internacia vespero ni eĉ ĝoje kunkantis kun Kimo, kiu fakte verkis kanton pri nia komuna kongresa sorto. Organizantoj de la sekva IJK en Hispanio promesis malpli da malsano, ni memoros tiun promeson!

Marko rakontas: Ĉi-jara IJK estis la unua, post eklerni Esperanton ĉi-februare. Estas mirinda, kiom bone Esperanto ebligas homojn interkomuniki, kaj sperti tiom internacian etoson kun dancado, kantado, kunlaborado ĉefe inter eŭropanoj kaj afrikanoj el pluraj landoj. Mia nura plendo estas, ke ne estis eble sekvi ĉiujn trejnadojn aranĝitajn, ili ĉiuj ŝajnas intereseĝaj, kaj mi bedaŭras ke mi ne povas esti en pli ol unu loko samtempe.

Mi rimarkis kaj fakte tre ĝuis, ke amike preni manon de aliaj viriĉoj okazas ĉi tie multe kiam mi parolas kun afrikanoj, en Nederlando, kie mi loĝas, tio ne estas kutima kaj eĉ ekzistas antaŭjuĝoj kontraŭ tio ĉi. Semajnojn poste homoj daŭre sendadas amikiĝpetojn per Fejsbuko por teni la kontakton.

Koffitche skribas: De la 5a ĝis la 12a de aŭgusto ni spertis nekredeblajn momentojn en Aneho. La miksitaj homoj de malsamaj kulturoj kaj rasoj kunvivis pace; tio ĉi montras ke ni povas vivi pace kvankam ni estas malsamaj. La plej granda parto neforgesebla estas la ekskurso al Togoville. La ĝemelaj kaj mirindaj arboj, kiuj klarigas la gravecon de viroj kaj virinoj en iliaj kulturoj. Mi forgesas nek la Kpalimean ekskurson, nek la Internacian Vesperon, nek la Kultur-Lingvan Festivalon. Ĝis nun mi respertas en mia kapo la aranĝon, kaj pli ol 26 landoj estis reprezentitaj. Mi ankaŭ akiris spertojn kiuj ebligas la disvolviĝon de nia movado

>>>>
iru al
paĝo 36

Mia Stranga Malkovro de Esperanto

Ŝajnas al mi, ke mi tro frue rezon-kapabliĝis, ĉar pluraj el miaj plej fruaj infanaĝaj memoroj rilatas al okazintaĵoj de kiam mi estis apenaŭ iom malpli ol dujara, kaj mia patrino kelkfoje eĉ priskribadis min kvazaŭ "etan plenkreskulon". Krome, malgraŭ tio, ke mi naskiĝis en romkatolika familio, kiu tute ne kredis je reenkarriĝo kaj longe antaŭ ol mi unuafoje aŭdis paroli pri la ebleco fizike renaskiĝi, mi tre ofte havis la klaran impreson, ke mi jam estis antaŭe vivinta, kaj eĉ vigle rakontadis anekdotojn al miaj gepatroj pri la tempoj kiam "mi estis granda." Ili nur pensis, ke mi estas tro imagema.

Tamen, estante pli-malpli dekjara, mi obstine ekiradis al la lingva fako de mia lerneja biblioteko esperante iam trovi tie "lernolibron de iu mistera kaj aparta lingvo". Mi ne sciis (aŭ eble "ne memoris?") la nomon de la serĉata lingvo, do, en mia infana lingvaĵo, mi decidetis ĝin nomi nur "tiu lingvo". Eble ĉar mi estis iom rezerviĝema, aŭ eble ĉar mi tute ne volis, ke miaj geamikoj aŭ familianoj pensu, ke mi frenezas, al neniu ajn mi parolis pri mia "obstina serĉado". Kial diable mi serĉadas lingvon, eĉ kies nomon mi ne konas? Ĉu mi vere frenezas?

Tamen, iun posttagmezon en septembro 1957, samklasano mia, kiu sciis, ke mi tre interesiĝas pri fremdaj lingvoj, diris al mi: "Mi bone scias, kiom multe lingvoj plaĉas al vi. Tial mi pensas, ke ĉi tiu artikolo sendube interesos vin". La artikolo titoliĝis: "Esperanto, unu lingvo por ĉiuj". Je tiu neforgesebla momento, mi ne povis ne ekscitiĝi, nek eksalti de ĝojo kaj pensi: "Mi finfine ĝin malkovris".

Dum mi tralegis la artikolon, miaj manoj tremadis kaj per malvarmaj gutoj mi ŝvitadis. Ĉu ĉi tio vere okazas ĉi-momente aŭ ĉu mi nur ĝin sonĝas? Jes, ial mi sciis, ke tiu lingvo ja ekzistas. Kiel klarigi eĉ al mi mem, kial mi kapablas rekoni ion, kion mi neniam antaŭe (almenaŭ dum la nuna vivo) vidis?

Kontentigaj logikaj respondoj al miaj demandoj

de Luis Jorge Santos-Morales, el Kolombio

neniam venis. Sed en la profundo de mia memo, mi forte sentis, ke tiu lingvo iel tre forte rilatas al mi. Ĉu eble mi estis esperantisto dum mia antaŭa vivo? Ĉu tio estis nur hazarda koincido inter mia infana imagivo kaj reala fakto? Ĉu eble temis pri la unua jamvidaĵa sperto (dĉjĉa vu) de mia vivo? Ĉu iu telepatie metis al mi tian ideon en la menson? Nu, mia samklasano ne pruntedonis al mi la revuon kie troviĝis la artikolo ĉar ĝi apartenis al sia patro, sed li afable sugestis al mi, ke tre probable en librovendejoj mi ion trovos pri Esperanto, sed bedaŭrinde neniu el la librovendistoj al kiuj mi demandis, estis neniam aŭdinta pri tia strangaĵo: Ĉu vere unu lingvo por ĉiuj? Ili moke demandis.

Ĉe tiom da neklereco, mi dume ĉesis serĉadi, kaj nur kelkajn tagojn poste, mi patrino sendis min al butikito aĉeti du krud-sukerajn blokojn, kaj manke de pakum-papero la butikisto utiligis ĵurnal-paperon por involvi la sukerblokojn. Jam reirante al mia hejmo kun la krud-sukeraj blokoj en la manoj, mi hazarde rimarkis, ke ĝuste meze de la ĵurnal-papera envolvajo estas reklameto, pli-malpli tekstanta "ESPERANTO, perkoresponda kurso. Bv. skribi al iu en Rosario, Argentino, krom la adreso de la loko".

Mi entuziasme sendis leteron al tiu adreso, kaj proksimume unu monaton poste mi ricevis afablan kaj interesan respondon de iu S-ro Tibor Sekelj, de kiu mi havis la honoron ricevi miajn unuajn esperantajn nociojn. Nun mi agnoskas, ke temis pri grandega honoro, ĉar tiam mi ankoraŭ tute ne sciis, ke li estas aparte grava kaj fama Esperantisto. Li kaj lia frato Antonije estis la aŭtoroj de tiu kurso. Mi eklernis (aŭ eble ekrelevis?) Esperanton kaj ekde tiam, mi ĝin ĝuegas kaj diskonigas.



Kio estas Ulambano?

Unu el la sezonaj eventoj, kiuj reprezentas japanian someron, estas ulambano aŭ ulambana danco.

Nun en Japanio oni okazigas diversajn eventojn sub la nomo de ulambano, la 15-an de aŭgusto (laŭ la suna kalendaro) en multaj lokoj, sed ankaŭ la 15-an de julio (laŭ la suna kalendaro) en Tokio k.a., aŭ la 15-an de julio (laŭ la luna kalendaro) en Okinavo k.a. La 15-a de aŭgusto laŭ la suna kalendaro estas ankaŭ la tago de la militofino, kaj la kondolenco al la viktimoj dum la batalo igas nin pli pensemaj por tiu ĉi tago.

de Sin'iti Yamaguti, el Japanio

Ulambano, japane bon, devenis de la sanskrita vorto ullambana; tiel oni ofte klarigas. Se tio estas ĝusta, ulambano estas unu el la budhismaj festoj, same kiel ekvinoska festo. Sed la afero estas pli komplika.

Prapatrismo en praa Japanio antaŭ la enkonduko de budhismo ligiĝis kun la rakonto en la Sutro pri Ulambano, kiu venis el Ĉinio, kaj en la epoko Nara la mikada kortego alprenis ulambanon kiel oficialan feston. Sed lastatempe aperis la nova teorio, ke





ulambano devenis ne de sanskrita ullambana, sed de urvan, kiu signifas animon en la antikva irana lingvo. (Esperanta vorto "ulambano" devenis kompreneble de la sanskrito.) Antikva irana gento, sogdo, kredis zoroastrismon, kiu havis la kulton por adori urvan, mortintan animon. La kulto venis al Ĉinio kaj miksiĝis kun la taoisma festo zhongyuan, en kiu oni petas indulgi mortintajn kulpojn.

Estas la fakto, ke oni rigardas ulambanon kiel feston por kulti prapatrojn aŭ mortintojn. Tial estas neeble, ke tiu kulto havas rilaton kun budhismo, kiu ne havas la ideon pri mortinta animo. Efektive en Barato kaj en la regionoj de teravada kaj tibeta budhismoj oni ne havas festojn similajn al ulambana festo.

Do, kio ligis ulambanon kun budhismo? Tio estas rakonto en la Sutro pri Ulambano. Tiu ĉi sutro, same kiel la Sutro pri Favoro de Gepatroj, estas tiel nomata "falsa sutro", kiu naskiĝis en Ĉinio. Eble vi opinias, ke ankaŭ aliaj multaj sutroj ne tre fidele rezervas la originalajn predikojn de Ŝakja-munio. Verkintoj de mahajanaj sutroj, kiuj naskiĝis en Bharato, havis almenaŭ la subjektivan motivon, ke ĝuste tiu estas la vera intenco de Ŝakja-munio. Sed verkintoj de "falsaj sutroj" en Ĉinio havis alian motivon.

Laŭ budhisma instruo bikŝuo estas valora ano. Fariĝi bikŝuo signifas forlasi hejmon kaj forĵeti familion. Bikŝuo ne edziniĝas nek havas gefilojn. Tio kontraŭstaras ĉinan malnovan tradicion, kiu estimas kultu siajn prapatrojn kaj rekompenci siajn gepatrojn por ilia favoro. Tial en Ĉinio oni ofte atakis budhismon, kritikante ke budhismo detruas moralon. Ĉinaj budhanoj sentis necesecon kompromisi kun ĉina malnova ideo kaj refuti, ke budhismo ne malzorgas pri prapatroj kaj gepatroj. Pro tio la Sutro pri Favoro de Gepatroj kaj la Sutro pri Ulambano predike admonis nin al rekompenco de gepatroj kaj al kulto de prapatroj.

Ĉu tio ĉi perfidas tradicion de budhismo? Mi pensas, ne. Tio estas la rezulto de plejble klopodo al enradikigo de budhismo en Ĉinio. Eĉ se la Sutro pri Ulambano ne estas Budha prediko en la strikta senco,

ni trovas tie lernindan punkton.

La enhavo de la Sutro pri Ulambano estas jene: Dum la somera seminario Maŭdgalajana serĉis la figuron de sia mortinta patrino, kiu troviĝis en la mondo de malsatuloj. Ĉar ŝi suferas pro malsatego, li donis al ŝi akvon kaj manĝaĵojn. Sed ili ĉiuj forbruliĝis, kiam ŝi estis prenonta ilin. Li estis tre malĝoja pro tio kaj demandis Ŝakja-munio; li respondis, "Via patrino malsupreniĝis al la mondo de malsatulo, ĉar ŝi estis avara dum la vivo. Sed se vi donos manĝaĵojn al ĉiuj bikŝuoj en la lasta tago de la seminario, parteton de la donitaĵoj prenos via patrino." Laŭ la konsilo li donacis al ĉiuj bikŝuoj, kaj ili tre ĝojis manĝante, trinkante kaj dancante. (Jen la origino de bon-danco en Japanio.) La ĝojo transiris al malsatuloj, kaj la patrino povis manĝi.

Tiu ĉi rakonto havas du malraciajn punktojn. Unue, Maŭdgalajana kiel bikŝuo ne povis havi provizaĵon por donaci al aliaj bikŝuoj. Due, se bikŝuoj ĝojas kaj dancas pro donaco, tio kontraŭas la disciplinaron (Bikŝuoj devas esti silentaj, kiam ili ricevas donacojn kaj prenas manĝaĵojn. Ili devas ne danci, nek spekti dancon.) Do, la rakonto tuj evidentiĝas fikcia. Ĉu la aŭtoro, kiu verkis tiun ĉi rakonton, ne havis ian intencon?



La esenca punkto por pripensi tion estas en tio, kian krimon faris la patrino de Maŭdgalajana. Pri ŝi troviĝas jena anekdoto: ŝi estis plena de patrina favoro kaj tre amis sian filon. Lun tagon, almozula ŝramano preterpasis ŝian domon, sed ŝi tute ne donacis al li, ne eĉ glason da akvo. Ŝi pensis, "Kiam mia filo revenos hejmen, se al li mankos manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, li estos kompatinda. Mi volas konservi akvon por mia filo." Eble ŝi estus laŭdata kiel bona patrino laŭ sekulara vidpunkto. Sed ŝia amo, kiu direktiĝas nur al ŝia filo, fariĝis malutila kontraŭ ŝi mem. Jen la kialo, ke budhismo ne ĉiam metas valoron sur amon interne de familianoj.

Se oni legas supraĵe la Sutron pri Ulambano, ĝi ŝajne laŭdas servemon al gepatroj. Sed ĝi inkludas pli profundan signifon, mi pensas. Ĝi akre malkovras, ke

amo estas aliflanke blinda pasio. Ni amas niajn gefilojn, pli ĝuste dirite, ni amas nur niajn gefilojn. Tia ĉi amo kondukas al egoisma amo aŭ persisto al memo. Multaj homoj en la nuna tempo kulpas same kiel la patrino de Maŭdgalajana, ĉu ne? "Donaco al ĉiuj bikŝuoj" montras memkritikon pri sia kulpo. La Sutro instruas al ni, ke ni devas havi la emon donaci ne nur al nia patrino sed al ĉiuj homoj.

Fonto: <https://www.facebook.com/notes/siniti-yamaguti/kio-estas-ulambano/2359668307592679/>

Duafoje en Seulo

verkis Jukka Pietiläinen

102a Universala Kongreso de Esperanto Seulo, 22–29 julio 2017

Universala Kongreso de Esperanto okazis duan fojon en Koreio, same en Seulo, sed por mi Koreio estis tute nova sperto. Mi iom naive pensis, ke Koreio estas io simila al Japanio (aŭ Ĉinio, kvankam mi scias ke Japanio kaj Ĉinio tre malsimilas), sed montriĝis ke ĝi estas io tute alia, malpli tradicia, eble pli malfermita al la okcidento kaj al la mondo ĝenerale. Koreio estas tre modernigita socio, bone funkcia.

La kongresejo en Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj (universitato, kie eblas lerni diversajn lingvojn kaj kulturojn) estis bone funkcia, sed iom formaleca konstruaĵo de la universitato. La kongresejo okupis la teretaĝon kaj la trian etaĝon facile atingeblan per lifto aŭ piede, survoje frekventis koreaj studentoj. En apuda kafejo la kafo kostis pli ol tuta manĝo (kelkaj pladoj) en universitata manĝejo. Se preni ambaŭ kaj kompari la kuran prezon kun nordeŭropaj prezoj, la oferto estis akceptebla. Tamen multaj rezignis pri kafo en tiu kafejo. La manĝejo ĝenerale estis interesa sperto, unue necesis aĉeti manĝokuponon el aŭtomato, ja per eksterlanda kreditkarto sed nur per korea skribo, kaj poste preni manĝon ĉe kelnero. Eblis uzi kaj bastonetojn sed ankaŭ forkon kaj kuleron.

El la estraranoj de UEA partoprenis nur kvar, kaj iliaj fotoj origine aperis en la kongresa libro, sed pro kutimo aŭ vanteco de estraranoj estis presita korekto-paĝo, kie aperis fotoj de ĉiuj estraranoj. Kiom tio kostis por UEA?

La plej ekzotika turisma celo eventuale estas la fermita landlimo inter la du Koreioj. La limo estis malfermita kaj limpasejoj funkciis dum pluraj jaroj, sed nun ĉio estas nur spektata de turistoj kiel restaĵoj de iu antikva civilizacio. Interese ke sud-koreoj konfiskis ĉion presitan, kio devenis el Nordo, eĉ bildlibrojn pri naturo, kiel malamikan propagandon. La konfiskaĵoj estis montritaj en vitrinoj de la limpasejo. Eblis ankaŭ spekti al la norda parto, sed videblis nur arbaroj kaj kampoj.

La libroservo havis malpli grandan ĉambron, tamen pli centran ol kutime kaj tial (ĉu vere?) ne necesis lasi sakojn al deponejo. Ankaŭ aŭtoraj duonhoraj okazis ne en la libroservo mem sed en apuda salono. Dum la ferma tago, kiam la libroservo kutime funkcias du horojn post la fermo, nun ĝi funkciis du horojn, sed dum la fermo. Tamen, laŭdire, estis klientoj ankaŭ tiutempe.

En la kultura programo pintis la nacia vespero, kiu ne estis enua prezento de unu grupo, sed vera kolekto el la korea kulturo de tradiciaj kantoj, el taekvondo kaj rokeca muziko. La bankedo estis vere luksa, sed trovi la lokon estis iom malfacile, ĉar eblis atingi konstruaĵon el diversaj flankoj, kaj la plej rekta vojo el bushaltejo aŭ piedira vojo ne estis la plej simpla. Plej fidinde estis sekvi la ĝeneralan direktoron. Pri urba akcepto eblas diri nur tion, ke malmultis la invitoj, kaj nenia onidiro pri la enhavo cirkulis poste.

Inter interesaj novaj aferoj estis ankaŭ la prezento de la aplikaĵo "Amikumu", kaj ĝia investa plano, kiu estas unu el malmultaj verkitaj ankaŭ en Esperanto. "Amikumu" estas aplikaĵo, per kiu eblas vidi la plej proksimajn aliajn aliĝintojn. Tio certe donas novajn eblecojn por individua turismo per Esperanto, kaj ankaŭ por montri al dubantoj, ke troviĝas ankaŭ aliaj parolantoj de Esperanto proksime. En Internacia Kongresa Universitato aperis ankaŭ tre aktuala prelego pri solidareca agado pri migrantoj kaj rifuĝintoj en Eŭropa Unio. Interesus krome scii, kial IKU-libro ĉi-jare aperis en formo de luksa bindita libro, do sekve plikosta ol kutime, kaj eventuale malprofita por UEA.

La fermo estis sufiĉe kutima, krom ke la elektro paneis por deko da minutoj dum ĝi. Feliĉe, troviĝis tegmentaj fenestroj, kaj ne regis plena mallumo, sed eblis daŭrigi la programon preskaŭ sen interrompo. Poste venis la infanoj el infana kongreseto, entute 46, iu eĉ diris ke temas pri rekorda nombro, eble rekorda almenaŭ por Azio. Mi pli frue kredis denaskajn esperantistojn esti nur plejparte eŭropa fenomeno, sed ili ja abundas ankaŭ en orienta Azio de kie granda plimulto el tiuj infanoj ĉi-jare venis.

Movade la aferoj aspektis almenaŭ supraĵe en bona ordo, ĉar praktike mankis kritikaj demandoj ĉe



kunsidoj, kie Centra Oficejo kaj Estraro respondas. Tamen en la Komitato de UEA la ĉefa diskuto temis pri la buĝeto kaj pri la granda malprofito, kiun la asocio havas pasint-jare kaj ĉi-jare, kaj laŭ prognozoj ankaŭ venont-jare. La buĝeto restis neakceptita kaj estos traktota per reta voĉdonado pli poste. Tute mankis tempo por diskuti pri strategio kaj io tia, dum eĉ praktikaĵoj estis en malordo. La nova alternativa prezento de la buĝeto igis libroservon subite aspekti malprofita kaj la revuon Esperanto, eĉ kun la nuna membronombro, tre profita. Tamen temas pri tio, kiel estas dividita la mono ricevita el kotizoj. Laŭ mia kompreno libroservo devus esti proksima al ekvilibro, sed la revuo Esperanto signife malprofita. La ĉi-jara buĝeto estis farita ekvilibra per aldono de la giganta sumo 90 000 eŭroj el subvencioj, tamen malklaris, kaj neniu povis respondi, por kia sumo subvencipetoj



estis entute faritaj, kaj por kiu celo estis petitaj la ricevitaĵoj kelkdek miloj da eŭroj.

Ankaŭ la Komitato fariĝis senkvoruma en la fina kunsido, ĉar pluraj komitatanoj foriris al la parlamentejo kie okazis pont-kunsido pri unuiĝo de Koreio. La revo de verŝajne ĉiuj koreoj, kio nun aspektas ne pli proksima ol pli frue. Jam la organizo de tia kunsido estis grava, krom ke partoprenis ankaŭ gravuloj de parlamento mem, interalie, la vicprezidanto de la Parlamento kaj du estroj de politikaj partioj. Krome aperis teksto-kolekto pri la temo senpage havebla en la kongresejo.

Fine de la kongreso estis anoncitaj eĉ du estontaj kongresurboj, nome en 2019 Lahti, Finnlando, kaj en 2020 Montrealo, Kanado. Ambaŭ estis kandidatoj jam ĉe pli fruaj konkursoj. Laŭ onidiroj, cirkulantaj en la kongresejo, UEA ankaŭ planas kongresi en Afriko, sed ne pli frue ol en 2024. El mia junaĝo mi memoras planon kongresi en Afriko jam en 1990.

Kaj fine, en Koreio eblis por la Esperanta teamo gajni la futbalmatĉon, kiu ĉi-jare okazis kontraŭ loka kvartala teamo, kiun la Esperanta teamo venkis je 1:0. Venontjare en Portugalio venko eble estas malpli facila.

Jukka Pietiläinen

Fotoj: **Anna Striganova**

Fonto: Papere: La Ondo de Esperanto, 2017, №8-9.

Rete: La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2017/09/uk-12>



Insido

Mi estas vorto vivanta kaj signifa nur interlinie, tiel kiel senzorga fiŝo.

Plejofte substantivo abstrakta mi estas, tiu, kiu deziras konkretiĝi, kaj

malfermatas ĉefe al sensaj adjektivoj nepre frandindaj.

Mi volas malarmi l' okulon per Poezio kaj milde do la mondon relerni.

Mi estas subjekto

poemo de Maria Nazaré Laroca

de propozicio, kiun mi laŭvole modaligas;

Mi ankaŭ estas predikato plena de atributoj, kiuj min konfuzas: bonodoraj revoj. Jen nure.

RADIORICEVILO

Mi sentas planedospiron
 en raŭko de ricevilo.
 Sur ĉiu diapazono
 embuskas por mi eventoj.
 El nigra kesteto fluas
 kaj voĉo sola,
 kaj bru' de tribunoj.
 Per turno facila de agordilo
 mi ŝanĝas planedohumoron.

PORDO

Infaneco...
 Homoj surstrate
 pri io debatas.
 Estas pordo farbata
 de l' suno

orkolore.
 Mi miras:
 kiom da jaroj trakuris –
 restis la pordo ora.

Amo ne havas nomon.
 Ĝi havas sunon
 sur la tuta ĉielo,
 blindigan.
 Ĝi havas venton,
 okulojn per sablo
 kovrantan.
 Al kiu mi iras,
 blindulo?
 De nun ne videblas.

SILENTO

Literoj, vortoj, propozicioj,
 ĉeestas interpunkcio,
 vortordo perfekte korekta,
 espero kaj ĝojo-malĝojo –
 ĉio en sortimento.
 En la silabinterplekto
 parolas ni per silento.

RIGARDO

Sunaj varmegaj okuloj.
 Ombro de birdo sur muro.
 Printempa aero
 komponas muzikon..
 El mia fenestro
 ŝajnas la mond'
 kvarangula.


**Poemeto por Marjorie Boulton
 de Maria Nazaré Laroca, el Brazilo**

Marjorie Boulton: poetin' multobla,
 nia plej brila stelo el poezio,
 virino homama, nin adiaŭas,
 kaj l' esperanta mond' sopiras orfa.

Tamen Parnaso glori al ŝi festas;
 gaje dancantaj muzoj ŝin akceptas,
 kaj al ŝi regalas per donac' unika:
 bunta bukedo da poemoj ŝiaj,
 kiuj iĝis vivantaj floroj lumaj.


**Kiel aromas nia terglobo
 de Elena Popova, el Bulgarujo**

Kiel aromas fojno falĉita,
 kiel odoras!...
 Tiom da herboj amasigitaj
 eligas spiriton.
 Aŭdu, la amon prikantas la griloj
 por revemuloj
 kaj la steloj invitas animojn al
 vastoj senlimaj...
 Nia terglobo kiel aromas!
 Kiel parolas sendorma!...


Balado pri stratoj de Krakovo
esperantigis Roland Platteau, el Francio

Fratinoj miaj, stratoj,
 - jen amodeklaro;
 Mia neĝo, mia krudvento, mia pluvo,
 Mia ununura patrujo estas vi.
 Neĝo bonodoras tiel, kiel lilio,
 kaj vino plukas en pluvo,
 kaj mi en mallum' aŭdas paŝi
 tiun 20-an jarcenton furioziĝantan .
 ...
 Miaj fratinaj stratoj,
 jen tio estas mia amdeklaro,
 lunfreŝaj nokte,
 sunebriaj tage.
 Kiu scipovus luli nin senforlase,
 nin instigi milde al rev"
 nin mallaŭtenoreli kaŝe
 "Ne ploru ja frato, ne ploru"?

de Konstanty Ildefons Gałczyński



"Sonfiguro* estas lingva rimedo por reliefigi iujn vortojn per speciala kombino de iliaj sonoj. Inter la sonfiguroj ni konsideru nur du ĉefajn.

Aliteracio estas ripeto de la samaj aŭ similaj konsonantoj: el stReĉita KoRd' KoRŝiRan melodion tiRis aRĉo. -- KoRd-vibRis la despeRo KoR-Kaŝita. -- kaj Fale Frakasiĝis AFrodita.

Rimo estas samsoneco inter du aŭ pluraj vortoj, de la vokalo akcenta kaj de sekvantaj son-elementoj. Por klasifikado de rimoj ni uzu la studon de Kolomano Kalocsay "La Esperanta rimo".

La rimoj dividiĝas en kvar grupojn:

1. *Pura rimo* estas sameco de ĉiuj akcentaj kaj postakcentaj vokaloj kaj konsonantoj: reĝo--seĝo, ardo--bardo, ventro--pentro (simpla pura rimo); bruo--truo (apogita rimo); kaptisto--kantisto (apogita sufiks-rimo); deklami--reklami, blondulin'--respondu lin (superrimo); venu jam--komprenu jam (transrimo); sendita--vendita (pseŭdo-superrimo); manĝadas--trinkadas (adasismo, sen apoga konsonanto kaj sen transrimo, nepre evitinda).

2. *Rimoido* estas sameco de ĉiuj akcentaj kaj post-akcentaj vokaloj, pli-malpli granda malsameco de konsonantoj: suĉi--ruĝi, polvo--orfo, vigla--nigra, kadro--patro, montri--tondri (parenc-rimo); veo--tombejo, ondo--tondro, sanga--angla (plus-konsonanta rimo); hieraŭ--fieran, morgaŭ--zorgaj (preskaŭ-rimo); li atentos--en la tendo (transkura rimo); patro--karto (inversa rimo); cindro--fingro (kombina asonanco); knabo--tago (milda asonanco).

Parenc-rimo, plus-konsonanta rimo kaj kombina asonanco estas senĝene uzeblaj anstataŭ pura rimo. La ceterajn rimoidojn oni uzu ŝpare, nur en ekstrema neceso.

3. *Agordo* estas sameco de ĉiuj rimelementoj escepte la akcentitan vokalon: arbo--korbo, reĝo--paĝo, ombro--decembro.

4. *Radik-rimo* estas pura interrimado de la radikoj, vokala kaj konsonanta malsameco de la finaĵoj: bela--anĝeloj, lando--grandaj, miele--pelas, fali--palajn. Tiajn kompatindajn rim-stumpojn ofte oni renkontas precipe ĉe rusaj poetoj. La radik-rimo ne estas rimo.

La pura rimo kaj rimoido povas esti ina (akcento sur antaŭlasta silabo: granda--landa) kaj vira (akcento sur lasta silabo: pord'--kord', dum--sum', min--destin').

Oni ne timu uzi eĉ kuraĝan rimoidon, se per ĝi oni gajnas fidelecon, naturecon de esprimo. Sed oni gardu sin kontraŭ trouzo, ĉar la tro multaj nepuraj

rimoj donas surdan muzikon, lignosonan, tedan knaron, senharmonian poezion. Kaj la idealo devas esti ĉiam la pura rimo kaj la forta parenc-rimo.



Rimarko: Adasismo estas sufiksa rimo; la vorto "adasismo" (ad-as-ismo) estas sprita elpensajo de Antoni Grabowski

Kompreneble, ne estas speciala bezono (krom se vi serioze intencas verki poeziaĵojn) memorfiksi ĉiujn specojn de rimo: sufiĉas distingi inter pura rimo, rimoido, agordo kaj radikrimo. Oni denove atentu, ke adasismoj kaj radikrimoj estas evitindaj.

- Mi deziras aldoni, ke lastatempe poetoj ofte verkas per blankaj (senrimaj) versoj. Tio donas grandan liberon en esprimado de pensoj kaj sentoj, kiun ne ĝenas nepra rimado; tamen parte perdiĝas la muziko de la lingvo.

- Oni demandis iun personon: "Kiam vi eklernis Esperanton?" -- "Antaŭ tri monatoj." -- "Do montru al mi viajn versaĵojn". Vere, multaj personoj ekde siaj unuaj paŝoj en Esperanto decidis riĉigi la Esperantan poezion per siaj verkoj originalaj kaj tradukaj. Sed oni memoru, ke minimumaj postuloj al la poeto estas perfekta lingvoscio, bona kono de la stilistiko kaj poezia tekniko (ritmo, rimo). Nu, kaj la cetero (unuavice, la talento), kiel oni diras, venas de Dio. Krome, verkado estas ne nur plezuro, sed ankaŭ labor(eg)o. Sed se vi sentas, ke vi nepre devas verki



en Esperanto, ke vi nepre devas provi viajn fortojn, ekverku, ne hezitu. Kredante je viaj ebloj, ne opiniu, tamen, ke vi jam atingis la pinton de Parnaso, kaj ne ofendiĝu kontraŭ redaktoroj kaj eldonistoj, se ili ankoraŭ ne opinias vin klasikulo de la Esperanto-literaturo.


el "Vojago en Esperanto-lando", leciono 3

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=4296>

En la ombro de la luno


Mitoj kaj legendoj pri eklipsoj estas abundaj. Povas esti mitologia besto kiu formanĝas la Lunon, aŭ iu Dio kiu ŝtelas la Sunon. Tio estas komprenebla. La Luno kaj la Suno estis personigitaj en multaj kulturoj. Tamen ni nun pli bone komprenas kiel la kosmo funkcias kaj scias ke estas neniu bezono por nevoziĝi pri eklipso. Nun ni simple povas miri la belecon de la kosmo.

Estas du specoj de eklipsoj, nome sunaj kaj lunaj. Ili estas pli malpli same oftaj, kvankam la ŝanco ke oni vidas lunan eklipson en sia vivo estas multe pli granda ol la ŝanco ke oni vidas sunan eklipson. La kialo estas ke la du malsamaj specoj funkcias laŭ malsamaj meĥanismoj. Por kompreni la faktorojn kiuj kaŭzas lunan aŭ sunan eklipson, oni devas unue kompreni la poziciojn de la Luno, Suno kaj Tero. Unue, la Suno estas pli malpli kvarcentfoje pli granda ol la Luno, sed tuthazarde, ĝi ankaŭ estas kvarcentfoje tiom malproksima. Tio signifas ke la Suno kaj la Luno aspektas same grandaj en la ĉielo, do la Luno povas kovri la Sunon entute. Kiam la Luno do estas inter la Suno kaj la Tero, ĝi kovras la Sunon, kaj ĝia ombro kovras parton de la Tero. Ene de tiu ombro, oni povas vidi sunan eklipson. La malo okazas kiam la Tero estas inter la Luno kaj la Suno. Tiam la Luno povas esti tute kovrita de la ombro de la Tero kaj oni povas vidi lunan eklipson sur la Tero.



Daŭras ĉirkaŭ 29 tagojn por la Luno ĉirkaŭiri la Teron, sed oni ne vidas eklipson ĉiumonate. Tio estas pro tio ke la Luno ankaŭ povas preterpasi la Sunon sen kovri ĝin. La orbito de la Luno havas klinangulon,

relative al la orbito de la Tero ĉirkaŭ la Suno. Tamen orbito kun klinangulo relative al ebena ĉiam trairas tiun ebena en du punktoj, nome la suprenira kaj la malsuprenira nodoj. Povas okazi ke tiuj nodoj estas ekzakte sur la linio inter la Tero kaj la




Suno kun unu nodo inter la Tero kaj la Suno kaj la alia malantaŭ ili. Tiam povas okazi suna eklipso kiam la Luno trairas nodon kaj luna eklipso duonan monaton antaŭe aŭ poste, kiam ĝi trairas la alian nodon. Sunaj kaj lunaj eklipsoj do okazas dum “eklipsaj sezonoj” kun du aŭ tri eklipsoj.

Sed se sunaj kaj lunaj eklipsoj okazas en paroj, kial estas tiom multe pli verŝajne ke oni vidas lunan eklipson ol ke oni vidas sunan eklipson? Tio dependas de kiel la eklipso aspektas surtere. La Luno estas malpli granda ol la Tero kaj ĝia ombro nur povas kovri etan parton de la surfaco. En tiu ombro la eklipso estas totala, sed apud ĝi estas sufiĉe granda regiono kie la surfaco estas parte enombrita. Tamen la Luno taŭgas tute en la ombro de la Tero, kvankam ĝi ja povas havi ruĝan koloron pro la lumo kiu trairas la teran atmosferon. Tio signifas ke ĉie kie oni povas vidi la Lunon, oni povas vidi la plenan eklipson. Tio estas la tuta nokta flanko de la planedo. Alia faktoro estas ke luna eklipso povas daŭri eĉ horon, dum totala suneklipso ne daŭras pli longe ol kelkaj minutoj, ĉar la ombro de la Luno moviĝas pli rapide ol la Luno mem kaj estas malpli granda ol la ombro de la Tero. Tio signifas ke oni povas vidi almenaŭ parton de luna eklipso ankaŭ se intertempe la Luno subiras aŭ leviĝas kaj ke oni havas pli grandan ŝancon ke eventualaj nuboj foriras dum la eklipso. Ankaŭ ne ĉiuj sunaj eklipsoj estas samaj. La orbito de la Luno ne estas perfekta cirklo, sed iom elipsa. Tial la Luno ne ĉiam havas la saman distancon ĝis la Tero. La nodoj en kiu eklipsoj povas okazi malrapide rondiras sub la influo de la Suno kaj foje unu el ili trairas la apogeon, la plej fora parto de la orbito. Tiam la Luno estas tro for dum la eklipso. Ĝi aspektas malpli granda en la firmamento kaj ne povas tute kovri la Sunon. Tiam la Luno kovras nur la mezon, kaj restas ringo videbla. Tion oni nomas “ringa eklipso”. Se oni enkalkulas ĉion, estas du aŭ tri eklipsoj jare kaj ĉiujn tri jarojn, du estas plenaj. La resto estas ringa aŭ parta.



La 21an de aŭgusto okazos plena suna eklipso. La tuta vojo de la plena ombro de la Luno iras tra Usono, sed ankaŭ en aliaj landoj oni povas vidi partan eklipson. La eklipso komenciĝos en la Pacifika Oceano, kie la Suno leviĝos kovrite! Poste la ombro ŝoviĝos al la nordokcidenta parto de la lando. Kaj iros samtempe suden kaj orienten, tra la mezo de la lando, ĝis ĝi atingos la Atlantan Oceanon. Tie ĝi pluigos, ĝis la

Luno definitive forŝoviĝos. La kialo ke la ombro moviĝas orienten estas ke ankaŭ la Luno moviĝas en tiun direkton. La Tero turnas sin en la saman direkton, sed ne tiom rapide, kiel la ombro de la Luno, do ĝi ne povas kontraŭlabori. La eklipso daŭras plej longe je la ekstretoj de la vojo de la ombro. En la mezo de la lando, oni estas tuj sub la Suno kaj la Luno, do la ombro estas eta cirklo. Je la flankoj tamen, la ombro estas streĉata de la kurba surfaco de la Tero. Tial la ombro iĝas pli longa kaj tio kaŭzas ke la eklipso




daŭras plej longe tie (iom pli ol du minutoj).

Lunaj eklipsoj povas esti belaj, kun misterioza, ruĝa koloro, sed sunaj eklipsoj ĉiam kaptis nin pli intense. Ne nur ilia malofteco igas ilin specialaj, sed ke la Suno malaperas je la mezo de la tago estas tre unika sperto. Tamen ili havis krom estetikan valoron ankaŭ scienca valoron. La plej bona ekzemplo estas la ĝenerala teorio de relativeco de Albert Einstein. Tiu teorio inter alie priskribas kiel la gravito de grandaj masoj kurbigas spacon. Pro tio ke lumo sekvas tiun kurbitan spacon, oni povas uzi grandan mason kiel lenzon kiu kurbigas la lumon. Por pruvi ke Einstein pravis pri tio, oni volis kompari la ĉielon kun kaj sen la Suno, por vidi ĉu la Suno influas la lumon de la steloj malantaŭ ĝi. Bedaŭrinde la Suno estas multe tro hela por vidi la stelojn dum la tago. Tial oni devis atendi ĝis la sekva plena suna eklipso. Pro tio ke la ĉielo estis malhela dum la tago, oni povis vidi ke la steloj kiuj devis esti malantaŭ la Suno aperis apud ĝi. La Suno do ŝanĝis la direkton de ilia lumo. Suna eklipso ankaŭ estas la nura momento dum kiu oni povas observi la eksteran atmosferon de la Suno, la korono, sen la uzo de sondiloj aŭ koronografo. Ĝi estas tre varma ekstera tavolo de la Suno kiun oni vidas kiel ringo ĉirkaŭ la Luno. Eklipsoj de la Luno ne ofertas multe da nova scienco, sed la Grekoj sukcesis mezuri la relativan grandecon de la Luno kaj la Tero per vidi kiel la ombro de la Tero aspektis sur la Luno.

Kvankam sunaj eklipsoj kaŭzitaĵ de la Luno ja estas plej belaj, la Luno ne estas la nura objekto kiu kovras la Sunon. Ankaŭ la planedoj Merkuro kaj Venuso fojfoje iras trans la Sunon. El ĉiuj planedoj el

la sunsistemo nur tiuj du povas kovri la Sunon, pro tio ke iliaj orbitoj ĉirkaŭ la Suno estas malpli grandaj ol tiu de la Tero. Aliaj planedoj do neniam estas inter la Tero kaj la Suno. La planedoj estas multe pli for de la Tero ol la Luno, do ili aspektas sufiĉe malgrandaj. Tial oni vidas ilin nur kiel etaj cirkloj kiuj transiras la surfacon de la Suno. Transiroj de Merkuro okazas ĉirkaŭ dekkvar fojojn dum jarcento, sed pro tio ke la orbito de Venuso estas pli granda, transitoj de tiu planedo estas tre maloftaj kaj ne plu okazos ĉi tiun jarcento. Oni ankaŭ observas transirojn de planedoj ĉirkaŭ aliaj steloj, sed tiuj steloj estas tiom for ke ili aspektas kiel punktoj anstataŭ diskoj. Pro tio oni ne vidas planedo transiri la surfacon de la stelo, sed mezuras periodikan ŝanĝiĝon de la heleco de la stelo. Tio estas unu el la plej ofte uzataj manieroj por detekti la ekziston de ekstersonsistemaj planedoj.

El ĉiuj anguloj de la mondo homoj vojaĝas al Usono por observi la eklipson kiu okazos ĉi-monate kaj sunaj eklipsoj estas inter la plej belaj kosmaj okazaĵoj kiujn oni povas vidi sen teleskopo. Tamen gravas ke oni bone protektas la okulojn per bonkvalitaj eklipsokulvitroj. Hejmaj trukoj kiel rigardi tra malnova KD havas grandan riskon de tralasi tro da radio kaj estas tre danĝeraj. Oniaj okuloj estas tro valoraj por riski tion. Se vi kapablas vojaĝi al la ĝusta loko ĝustatempe kaj faras ĝin sekure, certe provu observi la fenomenon kaj esperu je bona veTero, sed ne hezitu tro longe, ĉar la Luno forŝovas kelkajn centrimetrojn jare kaj estos tro for por kaŭzi suneklipsion post ĉirkaŭ miliardo da jaroj!



Afiŝita en **16 Aŭgusto 2017** de **Frank van Hertrooij**

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2017/08/16/en-la-ombro-de-la-luno/>



Tekrar merhaba,

Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı kitaptan kursumuza devam ediyoruz .

Derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın

çünkü bu dilbilgisi açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Metin içindeki tirelerin (" - ") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanılıyor.

"IĜ" (KUN ĈAPELO)

"Hodiaŭ," iun tagon diris Fraŭlino Saĝa, "vi lernos la diferencon inter la sufikso 'iĝ' kaj la sufikso 'ig'."

"Sed mi jam scias tion," diris Johano. "La unua havas ĉapelon kaj la dua ne havas ĉapelon."

"Estas alia diferenco, Johano; kaj tiu diferenco estas tute facila. Mi donos al vi multajn ekzemplojn, kaj vi baldaŭ komprenos - se vi estos diligenta."

"Nu atentu! Anglaj infanoj havas ruĝajn vangojn, ĉu ne?"

"Jes, anglaj infanoj havas tre ruĝajn vangojn."

"Sed kiam angla infano kun ruĝaj vangoj estas malsana li pal-iĝ-as."

"Mi estis malsana, kiam mi manĝis verdan pomon, kaj kiam mi manĝis kolorilojn," diris Johano. "Ĉu mi tiam pal-iĝ-is?"

"Jes Johano, vi pal-iĝ-is. Nu, rigardu mian poŝ-tukon. Ĝi esta seka, ĉu ne?"

"Jes, ĝi estas tute seka."

"Sed, se mi metas ĝin en akvon, ĝi malseki-iĝ-as, ĉu ne?"

"Jes, certe, ĝi malseki-iĝ-as rapide."

"Bone! Jen estas plua ekzemplo. Mia mano estas pura, ĉu ne?"

"Tute pura."

"Sed, se mi metus ĝin en la inkon ¹, ĝi malpur-iĝ-us, ĉu ne?"

"Certe, ĝi malpur-iĝ-us."

"Se mi metus miajn manojn en la inkon," diris Johano, "iu min pun-us. Tiam mi malĝoj-iĝ-us, kaj miaj okuloj plen-iĝ-us per larmoj. Tiam mia poŝtuko malseki-iĝ-us. ka se mi lavus miajn manojn, la akvo malpur-iĝ-us. Ka se mi frotus miajn manojn per la viŝtuko, la tuko ankaŭ malpur-iĝ-us. Tiam mia patrino koler-iĝ-us, kaj min punus denove. Tiam mi malĝoj-iĝ-us denove, kaj denove miaj okuloj plen-iĝ-us per larmoj. Tiam mia poŝtuko denove malseki-iĝ-us, kaj . . ."

"Ho, Johano, silentu! Vi tro parol-ad-as ². Ŝila, donu al mi ekzemplon, mi petas."

"Jes, Fraŭlino." La musineto pensis momente, tiam ŝi diris: "Dum la nokto estas mal-lume, set matene kiam la suno lev-iĝ-as, tiam lum-iĝ-as. Kaj vespere kiam la suno subiras, mallum-iĝ-as denove."

"Tre bone! Ho, tre bone. Ŝila! Vi estas diligenta kaj lerta musineto, kaj vi havos premion. Morgaŭ mi donos al vi grandan pecon da ĉokolado."

"Mi dankas vin, Fraŭlino."

"Johano," diris la instruistino, "donu al mi alian ekzemplon, mi petas."

Sed, Johano en-dorm-iĝ-is!

"La leciono fin-iĝ-is," diris la maljuna griza musino, kun rid-et-o.

¹ Ni skribas per plumo kaj inko

² "Parol-ad-as" signifas parolas kaj parolas kaj parolas; aŭ parolas senĉese; aŭ parolas denove kaj denove.

Ekler:

- ad kelimenin anlamına yinelenme, tekrarlanma anlamını katar
 -iĝ- Geçişli olan bir fiili geçişsiz hale getirir (veki -> vekigi = uyandırmak > uyanmak)

Sözlük	lavi	Sözlük	yıkamak	plua	ayrıca, daha başka
dormi, endormiĝi uyumak, uykuya dalmak	levi, leviĝi	yükseltmek,	yükselmek	premio	ödül
fini, finiĝi	bitirmek, bitmek	lumi, lumiĝi	ışık vermek,	puni	cezalandırmak
froti	ovmak		aydınlanmak	malpura, malpuriĝi	kirli, kirlenmek
ĝoja, ĝojiĝi	mutlu, mutlu olma	malluma, mallumiĝi	karanlık, karanlık	scii	bilmek
malĝoja, malĝojiĝi	mutsu, mutsu		olmak	seka, sekiĝi	kuru, kurumak
	olmak	pala, paliĝi	soluk, soluklaşmak	malseka, malsekiĝi	ıslak, ıslanmak
inko	mürekkep	paroli, paroladi	konuşmak, sürekli	sen-ĉese	durmadan, sürekli
kolera, koleriĝi	kızgın, kızmak		konuşmak	tute	tamamen
larmo	gözyaşı	plena, pleniĝi	dolu, dolmak	vango	yanak

Gramatiko - Esperantaj participoj en turka lingvo

AKTIVAJ PARTICIPOJ			PASIVAJ PARTICIPOJ		
Li estis	farinta faranta faronta	o adam (dün) yapmıştı yapıyordu yapacaktı	Ĝi estis	farita farata farota	o şey (dün) yapılmıştı yapılıyordu yapılacaktı
Li estas	farinta faranta faronta	o adam (şimdi) yapıyor yapacak	Ĝi estas	farita farata farota	o şey (şimdi) yapıldı yapılıyor yapılacak
Li estos	farinta faranta faronta	o adam (yarın) yapmış olacak yapıyor olacak yapacak olacak	Ĝi estos	farita farata farota	o şey (yarın) yapılmış olacak yapılıyor olacak yapılacak olacak
Li estus	farinta faranta faronta	o adam yapmış olsaydı yapıyor olsaydı yapacak olsaydı	Ĝi estus	farita farata farota	o şey yapılmış olsa yapılıyor olsa yapılacak olsa
Li estu	farinta faranta faronta	o adam yapmış olsun yapıyor olsun yapacak olsun	Ĝi estu	farita farata farota	o şey yapılmış olsun yapılıyor olsun yapılacak olsun

Gramatiko - Lingvaj Respondoj (8)**Pri «ujo» kaj «ingo»**

S-ro Fruictier klarigis al mi, ke, laŭ D-ro Zamenhof, ujo estas vazo aŭ kesto aŭ io simila, kiu entenas la tuton, kaj ingo entenas nur parton.

Carlo Bourlet, Lingvo Internacia, 1904, p. 170

Pri la ortografio de propraj nomoj

Propran nomon oni povas nun skribi tiel, kiel ĝi estas skribata en la gepatra lingvo de ĵia posedanto, ĉar en la nuna tempo la fonetika skribado de multaj nomoj kaŭzus tro grandan kriplaĵon de tiuj nomoj kaj diversajn malkomprenajojn. Sed tio ĉi estas nur rimedo provizora; ni devas celadi al tio, ke pli aŭ malpli frue en la lingvo internacia ĉiuj nomoj estu skribataj laŭ la fonetiko internacia de tiu ĉi lingvo, por ke ĉiuj nacioj povu legi ĝuste tiujn nomojn.

Esperantistische Mitteilungen, Junio 1904 (citita en Lingvo Internacia, 1904, p. 216).

Pri «daŭri» kaj «ĉesi»

«Daŭri»: esti plue, ne esti finita; «ĉesi»: komenci ne ...i, aŭ komenci ne esti. El tiu signifo sekvas la reguloj de uzado de tiuj vortoj kaj de iliaj devenaĵoj «daŭrigi», «ĉesigi» k.t.p. Ekzemple: oni povas diri: «la laboro daŭras» (la laboro estas plue, ne estas finita), sed oni ne povas diri: «mi daŭras labori» (mi estas plue labori! mi ne estas finita labori!); ankaŭ ne estas bone diri (kiel mi mem bedaŭrinde faris kelkfoje): «mi daŭrigas labori» (mi igas esti plue labori!); oni devas diri: «mi daŭrigas mian laboron» (mi igas mian laboron esti plue) aŭ «mi laboras plue». Oni povas diri: «mi ĉesas labori» (mi komencas ne labori) aŭ «la pluvo ĉesas» (la pluvo komencas ne esti), sed ne estas bone forlogiĝi per la analogio kun «komenci» kaj diri: «mi ĉesas mian laboron» (mi komencas ne ...i aŭ ne esti mian laboron!); estas preferinde diri: «mi ĉesigas mian laboron» (mi igas mian laboron komenci ne esti) .

Respondo 49, Oficiala Gazeto, III, 1911, p. 294

Kibeo, mezorienta bongustaĵo

Saluton verduloj! Hieraŭ mi faris manĝaĵon kiun mi volis nepre kundividi ĉi tie! Temas pri kibeo, kiu estas manĝaĵo simila al viandobuloj (tamen pli grandaj) sed ili estas manĝataj sen saŭco, tiu kaze ni povas diri ke ili estas kvazaŭ grandaj kroketoj. Kibeo estas disvastigata en multaj kuirartoj: arabaj (libana, siria, palestina, iraka), turka, armena kaj kaŭkaza inter aliaj!

Kibeo estas tiel malsamaj laŭ regionoj, ke ni, veganoj, por veganigi ĝin ne havas tiom da problemoj se ni volus ion novan aldoni aŭ ion tradician forigi :) Mi malkovris ĝin hazarde kaj tuj vidinte ĝin mi sciis ke mi volis fari! La maniero fari ilin estas vere simpla kaj mi konsilas vin ankaŭ provi!

Ingrediencoj:

250 gr bulguro
100 gr fajna teksturigita sojo (350 gr post enakvigo)
1 tranĉita cepo, 2 ajleroj
1 granda fasko da petroselo tranĉita
Mento kaj bazilio (opcie kaj laŭplaĉe)
salo, pipro, pulvorigita ajlo
5 supkulerroj da maizamelo (maizena)
Oleo

Paŝoj:

Enakvigi la bulguro almenaŭ tri horojn kaj la sojon



kun varma akvo tridek minutojn sufiĉos. Bone degutigu ambaŭ kaj miksu ilin kun la ajlo, cepo kaj petroselo

tranĉitaj. Aldoni salon, pipron kaj pulvorigitan ajlon laŭplaĉe, miksu ĉion bone en (volbo)pato kun iom da oleo, varmigu la miksaĵon kaj lasu kuirigi kvin minutojn konstante movante ĝin.

Aldonu maizamelon kun akvo (antaŭe miksitaj), kuiru mezfajre 5-6 minutojn pli ĝis la miksaĵo iĝas pli densa. lasu ĝin malvarmiĝi.

Prenu plenmanon da pasto kaj donu formon al la kibeoj, fritu en abunda kaj sufiĉe varma oleo ĝis rostiĝo, eligu el la pato kaj lasu ripozu dume sur kuireja papero por forigi la troan oleon, aldonu iom da citronosuko kaj servu kun salato.

Bonan apetiton!

Fonto: <http://veganarto.net/kibeo-mezorienta-bongustajo/>



el paĝo landa kaj kontinenta.

25 La ĝemelaj arboj montras la funkciadon de la socia vivo
>>>> inter viroj kaj virinoj; kiel la estro de ĉiuj domoj ili prizorgas la spiritan sekurecon de la tuta vilaĝo kaj batalas kontraŭ sorĉistoj kaj aliaj malbonaj spiritoj. Do, sub la ĝemelaj arboj estas ĉambreto, kaj kiam iu malsaniĝas en la vilaĝo, se estas spirita malsano, oni kunportas la malsanulon al la ĉambreto, kaj post tri aŭ kvin minutoj li resaniĝas. Tiu estas la religia parto, kaj la socia parto estas, ke la virina arbo surhavas multe da birdidoj kaj la vira ne havas eĉ unu, kvankam ili estas kune kaj similaj. Tio ĉi signifas, ke la virino estas la vivdonantino, kaj la viro devas protekti ŝin kaj la infanojn.

Konkludo: Ni, kiuj ĉeestis la Internacian Junularan Festivalon ĉi-jare, memoras ke kelkaj partoprenantoj el Afriko ne ricevis vizon. Tiaj limoj malebligas al multaj esperantistoj viziti aliajn landojn kaj partopreni en gravaj renkontiĝoj. Ĉar ni estas tutmonda movado, eblo partopreni estas grava egalrajta kaj demokratia temo. IJK en Afriko estas tiel vere valora okazaĵo. Kaj tiel la kongreso estis unika eblo por multaj afrikanoj ĉeesti grandan aranĝon en internacia etoso, por pli formalaj okazaĵoj kiel la komitatkunsido kaj pli neformalaj, kiel la piedpilka matĉo. Partoprenis 110 homoj el 27 landoj en kvar kontinentoj. Ĉirkaŭ duono de la partoprenantoj venis el dek afrikaj landoj, la alia

duono el 13 landoj de Eŭropo, kaj malmulte venis de Azio kaj Ameriko. Certe indas denove organizi IJK-on en Afriko.

Fonto: **La Balta Ondo** <http://sezonoj.ru/2017/09/tejo-12>



Solvo de la kruĉvort-enigmo

O	T	R	O		V	Z	U	T	B	O		10
G	N	O	L		D			O	R	G	O	9
O	I	N	I	A	R	K	U		O	N		8
P		D		T	O	A	P	S	A	S		7
A	R		O	N	E	T	N	A		L	O	6
	O	M	S	I	N	A	J	A	R	A		5
O	P			P			O	K	L	O		4
L		L	O		O	L	U	R	A	V	A	3
O		N	M	U	L	A	K		E			2
O	A	B	A		O	J	O	V	R	E	R	1
12	11	10	9	8	7	6	5	4	3	2	1	